

Esperanto
v. 19034/1983

LA POPOLA CINIO

中國報道
1983






La moskeo Aitiga

La tradicia foiro en Kashi

Fotoj de LAO BAI kaj HAI FENG



Diservo en la moskeo

Al la foiro



Kashi, en la okcidenta parto de Xinjiang, Ĉinio, kaj sur la antikva Silka Vojo kondukanta de Ĉinio al okcidenta Azio, estas loko loĝata de uiguroj. De la antikveco oni aranĝas foiron sur la stratoj apud la moskeo Aitiga.

En la foiro estas abundaj lokaj varoj, staras standoj por vendi diversajn manĝaĵojn, kio prezentas belan bildon montrantan uigurajn morojn. Junaj kaj maljunaj uiguroj en diversaj kostumoj venas tien por aĉeti ion aŭ fari diservon en la moskeo.





Ledajoj produktitaj en Kashi

Broditaj ĉapoj ŝatataj de ujuroj



Por vendi
kordmuzikilojn





Acida kaj akra fazeola gelatenajo

Bovajo kaj ŝafajo, ĉefmanĝaĵoj por la loĝantoj de Kashi





Elekto de tapiŝo

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Ujgura knabino

de LAO BAI

Ujguraj knabinoj de Xinjiang tre ŝatas kanti kaj danci. Ili kutime portas gazan jupon, veŝton kaj kolore broditan ĉapon. Iliaj longaj haroj estas interplektitaj en plurajn harligetojn, kiuj bele flirtas dum dancado.

SUR LA DORSKOVRILO:

Montvilaĝo en la Printempa Festo (Olepentraĵo)

de YANG SHAOLU

Tio estas ĝenro pri la Printempa Festo en la ĉina kamparo. Ĝi bildigas la ĝojan feston en montvilaĝo. (Bv. legi "Tradiciaj Festoj de Ĉinio" en ĉi numero).

KOLORAJ SERIOJ:

La tradicia foiro en Kashi

La monto Sanqing

Fotoj faritaj de Esp-istoj

Kokidaj tranĉaĵoj en celofano

Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (1)

Bildoj pri kamparana vivo

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La ĉina aviada afero en disvolviĝo

Dum postlaboraj horoj

Enhavo

| | |
|---|----|
| Ne nur bondezirojn | 2 |
| Ĝenerala nombrado de la ĉina loĝantaro | 3 |
| Kiel iris nia censo? | 4 |
| La ĉefaj ciferoj de la tria ĝenerala nombrado de la ĉina loĝantaro | 6 |
| MATERIALO: Nombro de la ĉina loĝantaro en diversaj periodoj | 8 |
| La ĉina aviada industrio en disvolviĝo | 16 |
| Youyu — oazo apud la Granda Muro | 14 |
| Amikeco inter Lusin kaj V. Eroŝenko | 9 |
| POR KOMENCANTOJ: Naskiĝotago de sinjorino Maria | 13 |
| ESP-NOVAĴOJ | 12 |
| Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (1): De Jining al Weishan-lago | 46 |
| VIDINDAJ LOKOJ: La monto Sanqing | 24 |
| Kiamaniere ili longigas sian vivon? | 19 |
| Komponisto kaj liaj komponaĵoj | 20 |
| Sur la insulo Sun' (Kanto) | 22 |
| Nemalaperinta neĝfloko (Novelo) | 26 |
| ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Tradiciaj festoj de Ĉinio (1) | 31 |
| Miniaturato de la ekonomia disvolviĝo de ĉinaj nacimalplimultoj | 32 |
| EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: La antikva landlima urbo Kashi | 34 |
| MIA VIVO: Inter la argilaj figuroj de Qin-dinastio | 38 |
| 5 000 JAROJ DE ĈINIO: La kamparana insurekcio kaj la naskiĝo de la Orienta Han-dinastio | 41 |
| TRA LA MONDO | 36 |
| KURANTAJ AFEROJ | 44 |
| KORESPONDI DEZIRAS | 43 |

| JARABONTARIFO | Belgio | BF | 180.00 | Finnlando | FMK | 24.00 | Italio | Lit | 5200 | Nederlando | Gld. | 12.60 | Portugalia | Esc | 400 | | |
|---------------|--------|-------|-------------|-----------|-------|----------|--------|-------|------------|------------|------|-------------|------------|-------|--------|-------|------|
| Aŭstralio | \$A | 5.70 | FR Germanio | DM | 10.80 | Francio | FF | 26.00 | Japanio | Yen | 1400 | Nov-Zelando | NZ\$ | 6.70 | Usono | US\$ | 6.00 |
| Aŭstrio | Sch | 80.00 | Britio | £ | 3.00 | Hispanio | Pts | 600 | Jugoslavio | Din. | 180 | Svisio | SF | 10.00 | Kanado | Can\$ | 7.20 |

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00

Ne nur bondezirojn



ĈE la sojlo de la jaro 1983, en la nomo de siaj laborantoj, la redakcio de EPC sendas korajn dankojn kaj novjarajn bondezirojn al la legantoj, perantoj, kontribuantoj kaj ĉiuj aliaj amikoj, kiuj donas subtenon al nia gazeto.

Tamen ĉi tie ni volas diri al vi ne nur vortojn bondezirajn.

Kvankam nia gazeto atingis certajn sukcesojn dank' al la varma subteno de diverslandaj amikoj kaj ricevis laŭdojn de niaj legantoj, tamen tiujn laŭdojn ni povas preni nur kiel kuraĝigon al ni en plua antaŭenmarŝo. Por plibonigi nian gazeton ni decidis instali ĉi-jare kvar novajn rubrikojn: "Enciklopedieto de Ĉinio", "Historiaj Urboj", "Ĉinaj Eminentuloj k Esperanto" kaj "Por Komencantoj". Ni ankaŭ malfermos la rubrikon "Ĉinlingva Kurso" tuj post la fino de la preparado. Ni jam anoncis, ke ni decidis aldoni ekde 1983 4 kolorajn paĝojn. Ni esperas ke vi skribos al ni viajn opiniojn pri la menciitaj novaj rubrikoj.

Kvankam nia revuo sin dediĉas ĉefe al raportado pri ĉinaj aferoj, tamen ĝi ankaŭ zorgadas pri la internacia lingvo kaj la Esperanto-movado. En la pasinteco ni jam faris fruktodonajn klopodojn kaj ĉi-jare ni

laboros kun ankoraŭ pli forta strebado. Ni sincere deziras, ke esperantologoj kaj aktivuloj de nia movado sendu al ni artikolojn, informojn kaj fotojn. Ni esperas ke multajn helpojn donos al ni la esperantistaj individuoj kaj organizaĵoj de la tria mondo, precipe tiuj de la landoj en Azio, por ke pli da artikoloj pri la tiea Esperantomovado aperu en nia revuo.

La orient-eŭropaj landoj estas regiono, kie la Esperanto-movado estas sufiĉe forta. Kiel Esperanto-revuo distribuata tra la mondo, EPC devas dediĉi pli da paĝoj al tiea Esperanto-movado. Por tio ni sincere petas, ke la amikoj en la orient-eŭropaj landoj nin helpu diversflanke por ŝtopi la breĉon en nia raportado en la pasinteco. Ni kredas, ke ili certe plenumos nian peton kun plezuro.

Nian komunan aferon sendube favoras tio, ke la revuo El Popola Ĉinio fariĝu eleganta, vere internacia kaj utila al la tuta Esperanto-movado. Ni kredas, ke ni certe povos iam prezenti al la legantoj nian revuon kun pli bela aspekto kaj pli riĉa enhavo, en energia kunlaboro de niaj legantoj kaj subtenantoj en diversaj landoj.

La Redakcio de EPC

Ĝenerala nombrado de la ĉina loĝantaro

ĈINIO havas 1 031 882 511 loĝantojn. Tio estas citita el la ĉefaj ciferoj de la plej grand-skala nombrado de la ĉina loĝantaro, kiu komenciĝis la unuan de la lasta julio post zorgema preparado de du jaroj kaj duono. La censo estas ne nur zorgata de la ĉina popolo, sed ankaŭ atentata de multaj aliaj landoj.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, en 1953 kaj 1964 oni dufoje faris ĝeneralan nombradon de la ĉina loĝantaro, kio tre utilis al plifortigo de la demokratia reĝimo kaj al planado de ekonomia konstruado. Pasis 18 jaroj depost la dua censo, kaj la stato de la ĉina loĝantaro multe ŝanĝiĝis. Por klare koni la dislokiĝon de la loĝantaro la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio decidis fari la trian ĝeneralan nombradon de la loĝantaro. Tio havas gravan signifon por la ekonomia konstruado de Ĉinio, laŭplana limigo de la loĝantara kreskado kaj aranĝo de la popola materia kaj kultura vivo.

Ĉar la nombro de la ĉinaj loĝantoj jam superis miliardon inkluzive de tiuj de Taiwan-provinco, tial la ĝenerala nombrado estas pli grand-skala ol la antaŭaj. Kaj krome, la censo entenas sume 19 erojn pli multe je 10 ol tiu de 1964.

“Rimedo de la Tria Ĝenerala Nombrado de la Ĉina Loĝantaro” publikigita de la Ŝtata Konsilantaro difinis, ke nombrendaj estas homoj, kiuj posedas ŝtataneccon de la Ĉina Popola Respubliko kaj loĝas en ĝi. La censo ampleksas sekson,

aĝon, naciĉevenon, edukitecon, geedzecon, profesion kaj okupojn de la okupo-posedantoj, naskonombron kaj tiun de vivaj naskitoj, naskonombron de la virinoj en 1981 ktp. Tio celas ne nur koni la precizan nombron de la loĝantaro, sed ankaŭ ĝian kvaliton, kaj la nombron, dislokiĝon, edukitecon kaj profesion de la ĉiunacieca loĝantaro. Pose-dante tiujn fidindajn materialojn, la registaro povas pli bone elabori politikojn konformajn al la ŝtataj cirkonstancoj. Sekve, la censo estos utila al direktado de la ekonomiaj kaj kulturaj laboroj de Ĉinio kaj al ellaboro de longtempa plano de la socia disvolviĝo.

Ĉinio estas disvolviĝanta socialisma lando kun grandnombra loĝantaro. Pli ol 80% de ĝiaj loĝantoj vivas en la kamparo. Ĉinio estas subevoluinta ekonomie, ĝiaj scienco kaj teknikoj estas kompare postiĝintaj. La Komputera Centralo sub la Nacia Statistika Buroo de Ĉinio estis starigita nur antaŭ kvin jaroj. Sendube estas malfacile fari la nombradon sub tiaj cirkonstancoj.

Tamen Ĉinio havas konstantan loĝanto-registran sistemon kaj loĝantaran statistikon. Surbaze de tio la Ŝtata Statistika Buroo publikigis la ciferojn de la ĉina loĝantaro en la pasintaj jaroj, kio kreis favorajn kondiĉojn por ĉifoja nombrado.

Pro ekonomia subevoluo en Ĉinio la cirkula kvanto de loĝantoj estas malgranda, kio reduktis la malfacilaĵojn en la nombrado. La statistiko en 1980 montris, ke la loĝantoj, kiuj cirkulis inter

urboj kaj komunumoj, konsistis nur 1.93% de la tuta loĝantaro.

Por fortigi la gvidadon super la nombrado, en novembro de 1979 la Ŝtata Konsilantaro organizis la Gvidgrupon pri Loĝantara Nombrado. Komence de 1980 ĝi ellaboris “Rimedo de la Tria Ĝenerala Nombrado de la Loĝantaro” kaj kondukis la provadon en la urbo Wuxi kaj la gubernio Wuxi kun 950 000 loĝantoj de Jiangsu-provinco. Kaj poste ĝi faris provadojn en lokoj kun 3.43 milionoj da loĝantoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Pere de la provadoj oni akumulis laborosperton kaj elkulturis nombron da ĉefaj laborantoj por la censo. Samtempe ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj starigis respektive siajn proprajn gvidgrupojn pri la censo kaj koncernajn plenumajn instituciojn. Krom la Komputera Centralo sub la Ŝtata Statistika Buroo oni establis komputerajn staciojn en naŭ provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj kaj elkulturis nombron da komputeristoj. Ĉi-foje pli ol kvin milionoj da laborantoj partoprenis en la censado. La Fonduso de Loĝantaraj Aktivadoj de UN kontribuis al la loĝantara nombrado de Ĉinio per 15.6 milionoj da usonaj dolaroj, kiuj, krom la elspezo por la senditaj specialistoj, estas plejparte uzataj por aĉeti komputerojn por la nombrado. La Departemento de Teknika Kunlaboro kaj la Statistika Departemento de UN sendis fakulojn al Ĉinio por esplori kaj helpi la censon, kio tre utilis al la laboro.

Kiel iris nia censo?

de ZHOU QUNWEN

ĜENERALA censo pri la ĉina loĝantaro, konsistiganta kvaronon de la homaro, ja dependis de la konsciencia laboro de la pli ol 5 000 000 censistoj inter la centoj da milionoj da loĝantoj urbaj kaj kamparaj por akiri fidindajn informojn per vizaĝ-al-vizaĝa enketado. Kiel do ili laboris? Kiajn malfacilojn ili renkontis en la laboro? Ĉu ili ricevis aktivan kunlaboron de la loĝantoj kaj subtenon de la koncernaj flankoj? Kun tiuj demandoj ni faris observojn kaj intervjuojn en Pekino, Tibeto kaj Yunnan.

ĈE CENSA STACIO

La ĉi-foja censo estas farita ĉefe ĉe la distriktaj censaj stacioj, al kiuj ĉiu familio devis sendi raportanton. La censaj stacioj en la urboj funkciis ĉe loĝkvartalaj komitatoj kaj tiuj en la kamparo ĉe la oficejoj de la produktaj brigadoj (samnivelaĵoj kiel vilaĝoj).

Ni vizitis la censan stacion de la Norda Yuetan-strato. Antaŭ la stacio flirtis diverskoloraj flagoj. En la ĉambro pendis la emblemo kaj klarigo pri la tria censo pri la ĉina loĝantaro. La censistoj kun ruĝaj insignoj sur la brusto sidis antaŭ la tablo kaj ĝentile pridemandis la raportantojn.

La unua raportanto estis Gao Han, scenaristo de la Pekina Filmostudio. Lia familio konsistas

el kvar membroj: lia edzino instruanta en la Pekina Kinematografia Instituto, liaj du filoj ankoraŭ ne edziĝintaj tamen jam sur laborpostenoj kaj li mem. Ĝi estas tipa mezgranda familio de la nunaj urboj en Ĉinio. Kiam la dek naŭ censaj eroj estis glate registritaj, la censisto ripetis ilin por kontrolo kaj certiĝinte pri ilia ĝusteco li petis la raportanton skribi sian nomon.

Efektive, antaŭ la registrado la censistoj jam vizitis la familiojn por akiri necesajn informojn pri ili. Por eviti longtempa vikatendado dum la censa registrado ili tiel aranĝis, ke la raportantoj vizitu la registrejon en difinita tempo. Duontaga libertempo estis donita al la laboristoj kaj oficistoj, por ke ili plenumu sian censan raporton en la difinita tempo.

Dumlonge, la gazetaro, radio-stacioj kaj televidaj stacioj de Ĉinio vaste propagandis la signifon kaj postulon de la ĉi-foja censo pri loĝantaro, por ke bone efektiviĝu la alvoko "ĉiu civitano plenumu sian devon en la censo pri loĝantaro".

En la unuaj tagoj de la censado 140 oficistoj el 35 fremdlandaj ambasadorejoj al Ĉinio kaj reprezentantoj de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj vizitis censajn staciojn en Pekino. Ili estis profunde impresitaj de la zorge pre-

parita kaj bonorde farata registrado.

S-ro Rafael M. Salas, plenumanta prezidanto de la Fonduso por Loĝantaraj Aktivecoj de Unuiĝintaj Nacioj, vizitis Sjiqing-popolkomunumon en la antaŭurbo de Pekino. La plejparto de la estroj, librotenistoj kaj labor-poentaj registristoj de ĝiaj 15 produktaj brigadoj servis kiel censistoj kaj konsilantoj. Ĉe la censa stacio de la komunuma maljunulejo, Salas konversaciis kun multaj maljunuloj kaj detale pridemandis ilian pasintan kaj nunan vivon. Kiam la 93-jara Qi Yanling diris al li, ke li nun ankoraŭ estas sufiĉe forta por piediri pli ol dek kilometrojn por ekskursi al Xiangshan-parko, Salas deziris al li longan vivon.

S-ro Y. C. Yu, oficisto de la Statistika Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj, donis al ni multe da helpo en nia ĉi-foja censo pri la loĝantaro. Kiam li inspektis la censan stacion en la jura fakultato de la Pekina Universitato, li proponis, ke oni registru en ĉambro apartigita disde la atendejo, por ke raportantoj povu respondi demandojn, kiujn ili ne volas fari antaŭ la publiko. Tiu ĉi propono tuj estis akceptita.

S-ro Kannisto, la inter-regiona ekskonsilanto de Demografia kaj Socia Statistiko, kaj lia edzino vizitis la Duan Ŝpinteksan Fabri-

kon de Pekino, kie starigis kvin censaj stacioj. La geedzoj tre interesiĝis pri tio, ke la raportantoj plejparte estas virinoj. La interpretisto diris al ili, ke ĉinaj virinoj ĝuas egalajn rajtojn en sia familio kiel viroj kaj ordinare scias siajn familianojn pli bone ol ili. Multaj el la virinoj mem estas familiaj mastrinoj.

Post la vizitado s-ro Kannisto diris al mi, ke bona organiza laboro kaj kunlaboro de la amasoj sendube estas grava garantio por sukceso en la censo pri la loĝantaro.

KONTRIBUOJ FARATAJ DE AKTIVULOJ

La censo pri la loĝantaro en Ĉinio estis farata sub la gvido de la Ŝtata Konsilantaro kaj la loĝkaj registaroj diversnivelaj. Ekde 1980, censaj gvidaj grupoj kaj organoj de ĉiuj niveloj jam estis starigitaj iompostiome. Registra laboro estis efektivegita rekte en la bazaj loĝ-kvartalaj komitatoj en la urboj kaj produktaj brigadoj en la vilaĝoj.

Ĉiu loĝ-kvartala komitato, kiu estas amasa organizo gvidata de la subdistrikta oficejo, ordinare konsistas el kvin membroj, kiuj estas emeritoj aŭ dommastrinoj fervoraj en servo al kolektivo. Ili vivas en la popolamasoj. Ordinare iliaj taskoj estas helpi la bazajn registarojn en prizorgado de media purigado, edukado de junuloj, pacigo de najbaroj kverelantaj, kio ebligis al ili pli bone koni la adresojn, familiajn membrojn kaj viv-staton de la loĝantoj en sia distrikto.

La subdistrikta oficejo de Longtan en sudorienta Pekino prenis sur sin la censadon de 60 000 loĝantoj en 16 000 fami-

loj. Ĝi disponas pri 861 aktivuloj fervore servantaj al la popolamasoj sub 25 loĝ-kvartalaj komitatoj. Ĉiu el la censistoj kaj konsilantoj de tiu oficejo laboris sub la helpo de kvin aktivuloj, kiuj servis al li kiel voĝgvidantoj kaj liveris al li necesajn informojn.

En tiu loĝ-kvartalo estas 50-jara fraŭlino, al kiu plej malplaĉas pridemandoj pri ŝia fraŭlineco. Frue informiĝinte pri tio pere de la aktivuloj, la registranto ne faris al ŝi tiajn demandojn kaj plenumis la registradon sen veneni la humoron de la fraŭlino.


La aktivuloj de tiu distrikto ankaŭ faris kontribuon al la ĝusteco de la censo per livero

de fidindaj materialoj al censistoj. Dank' al ilia helpo, dum rekontrolado tiu ĉi oficejo korektis 129 erarojn en la registra laboro kaj registris 229 homojn, kiuj ne troviĝis en la antaŭaj registrolibroj de loĝantoj.

NENIO ESTAS MALFACILA POR CENSISTOJ

La plejparto de la censistoj kaj konsilantoj renkontitaj de ni estas ŝtataj oficistoj, laboristoj kaj instruistoj. Kvankam iuj el ili estis diplomitaj de alta lernejo kaj havis multjaran sperton en laboro, tamen ili ĉiuj devis akcepti severan trejnadon mallongan por la laboro kaj nur tiuj, kiuj sukcese trapasis la ekzamenon, povis fariĝi oficialaj censistoj.

Oficistoj de la Sveda Ambasadorejo al Ĉinio vizitas censan stacion en Pekino.



La Ĉefaj Ciferoj de la Tria Ĝenerala Nombro de la Ĉina Loĝantaro

| Enhavo | Nombroj de loĝantoj | Procentoj |
|--|---------------------|------------------------------------|
| La totala nombro | 1 031 882 511 | |
| Viroj | 519 433 369 | 51.5% kompare kun la totala nombro |
| Virinoj | 488 741 919 | 48.5% |
| Han-oj | 936 703 824 | 93.3% |
| Anoj de la nacimalplimulto | 67 233 254 | 6.7% |
| Loĝantoj diplomitaj de alta lernejo | 4 414 495 | |
| Loĝantoj ne finintaj studadon en alta lernejo | 1 602 474 | |
| Loĝantoj kun edukiteco de supera mezlernejo | 66 478 028 | |
| Loĝantoj kun edukiteco de malsupera mezlernejo | 178 277 140 | |
| Loĝantoj kun edukiteco de elementa lernejo | 355 160 310 | |
| Loĝantoj naskitaj en 1981 | 20 689 704 | naskokvanto: 20.91 ‰ |
| Loĝantoj mortintaj en 1981 | 6 290 103 | mortokvanto: 6.36 ‰ |

NOTO:

Krom la totala nombro, la aliaj nombroj en la listo ne inkluzivas tiujn de Taiwan-provinco kaj Jinmen, Mazu kaj kelkaj aliaj insuloj de Fujian-provinco kaj regionoj de Hongkong kaj Aomen.

★ ★ ★

La tasko de censistoj estis peza. Ordinare registrado estis farata ĉe la censaj stacioj, sed maljunulojn, malfortulojn, malsanulojn kaj kriplulojn kaj tiujn, kiuj ne povis veni pro aliaj kaŭzoj, censistoj devis persone viziti por fari registron ĉe iliaj domoj. Kelkiam ili devis venki multajn malfacilojn.

Xiao Diancai estis censisto en Badaohe-komunumo de Huairou-gubernio 50 kilometrojn for de Pekino. Tiu komunumo situas pliparte en montregiono 1 500 metrojn super la marnivelo. La censado komenciĝis en

la tempo, kiam komunumanoj rikoltis tritikon. Multaj el ili ne povis ĝustatempe veni al la censa stacio, Xiao Diancai do ĉiutage iradis pli ol dek kilometrojn sur montvojoj en frua mateno, tagmezo kaj vespero por ilin viziti en "libera horo" por fari registradon al 68 familioj. Li ĝustatempe plenumis sian taskon.

La plej granda malfacilo en la censa laboro estas fari enketon al tiuj, kiuj ne povas bone sin esprimi. En iu Komuna Hejmo de Qinghe-urbeto en la norda antaŭurbo de Pekino

estas pli ol 400 senparencaj maljunuloj kaj ĉ. 100 idiotoj. Maljuna Ge, la eksestro de la Hejmo, estis elektita kiel censisto. Li diris al mi, ke li efektivigis la censon dank' al la helpado de malnovaj oficistoj, kiuj bone konas la loĝantojn. Kelkiam li devis ripetfoje kontroli antaŭajn registrojn faritajn antaŭ kaj post ilia eniro al la Hejmo. Kelkfoje eĉ okazis, ke por konstati ion li devis fari zorgan socian enketadon.

Inter tiuj homoj troviĝas virino kun du filinoj, kiuj ĉiuj estas idiotoj. Kiam ili estis sen-

Nombroj de loĝantoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj de armeanoj

| | | | |
|--------------------------------------|------------|--|------------|
| Urbo Pekino | 9 230 687 | Hubei-prov. | 47 804 150 |
| Urbo Tianjin | 7 764 141 | Hunan-prov. | 54 008 851 |
| Hebei-prov. | 53 005 875 | Guangdong-prov. | 59 299 220 |
| Shanxi-prov. | 25 291 389 | Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono | 36 420 960 |
| Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio | 19 274 279 | Sichuan-prov. | 99 713 310 |
| Liaoning-prov. | 35 721 693 | Guizhou-prov. | 28 552 997 |
| Jilin-prov. | 22 560 053 | Yunnan-prov. | 32 533 817 |
| Heilongjiang-prov. | 32 665 546 | Tibeta Aŭtonoma Regiono | 1 892 393 |
| Urbo Ŝanhajo | 11 859 748 | Shaanxi-prov. | 28 904 423 |
| Jiangsu-prov. | 60 521 114 | Gansu-prov. | 19 569 261 |
| Zhejiang-prov. | 38 884 603 | Qinghai-prov. | 3 895 706 |
| Anhui-prov. | 49 665 724 | Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono | 3 895 578 |
| Fujian-prov. | 25 931 106 | Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono | 13 081 681 |
| Jiangxi-prov. | 33 184 827 | Taiwan-prov. | 18 270 749 |
| Shandong-prov. | 74 419 054 | Regionoj de Hongkong kaj Aomen | 5 378 627 |
| Henan-prov. | 74 422 739 | Ĉina Popola Liberiga Armeo | 4 238 210 |

★

★

★

La Elektronika Komputera Centro por plenumi nombradon de loĝantoj de la tuta lando funkcias en tiu domo kun areo de 16 000 kvadrataj metroj en Pekino.



Materialo:

NOMBRO DE LA ĈINA LOĜANTARO EN DIVERSAJ PERIODOJ

| Periodo | nombro de la tutlanda loĝantaro |
|--|---------------------------------|
| Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. —24 p.K.) | 59 590 000 |
| Tang-dinastio (618 — 907) | 52 910 000 |
| Norda Song-dinastio (960 —1127) | 46 730 000 |
| Yuan-dinastio (1279 —1368) | 58 830 000 |
| Ming-dinastio (1368 —1644) | 66 590 000 |
| 1764 (Qing-dinastio) | 205 590 000 |
| 1849 (Qing-dinastio) | 412 980 000 |
| 1932 | 488 300 000 |
| 1959 | 475 000 000 |
| 1953 | 601 938 035 |
| 1964 | 723 070 269 |
| 1981 | 996 220 000 |

★

★

★

ditaj de sia loĝ-kvartala komitato al la Hejmo antaŭ kelkaj jaroj, iliaj loĝantokartoj estis transdonitaj, sed en ili ne ĉio estis klara. Ĉi-foje maljuna Ge vizitis membrojn de tiu komitato kun iliaj kartoj por helpo kaj solvis la problemon.

RESPEKTO AL KUTIMOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

Por la tibetanoj la ĉi-foja censo pri la loĝantaro estis la unua en la historio. Ĉar Tibeto ne partoprenis en la antaŭaj du censoj, tial ne estis preciza statistiko pri ĝia loĝantaro.

Tibeto estas vasta kaj maldense loĝata. Iuj paŝtistaj loĝ-


punktoj estas tiel malproksime de urboj, ke oni bezonas 20 tagojn por atingi tie rajdante. Por la ĉi-foja censo, jam frue en marto de la pasinta jaro, la registaro de la aŭtonoma regiono trejnigis 10 000 tibetanajn kaj hanajn censistojn, kaj 1 000 el ili estis senditaj al tendoj de paŝtistoj por propagandi la signifon kaj metodon alprenitan de la censo pri la loĝantaro. Tibeto pli frue komencis la censon en majo. La tibetanoj ne volas mencii la nomojn de la mortintoj. Por respekti ilian kutimon la censistoj klopodis akiri necesajn informojn nerekte.

En Yunnan-provinco de sudo-occidenta landlima regiono de Ĉinio, kie mikse loĝas 23 naciecoj, respekto al la kutimoj de nacimalplimultoj estas aparte grava por censistoj en la laboro. Ekzemple en loko, kie kune loĝas ĵi-a kaj hani-a naciecoj, kiam junulo fianĉiĝis, kutime li transloĝiĝas en la domon de la fianĉino por kunloĝi kun ŝi. Tamen la geedziĝo okazos nur post kiam la virino naskos infanon. Pro tio la tieaj censistoj permesis, ke la junaj virinoj memvole raportu, ĉu ili edziniĝis aŭ ne.

Iuj civitanoj en nacimalplimultaj regionoj ne povis ĝuste rememori siajn naskiĝtagojn. Kiam oni demandas la aĝon de maljunuloj de la va-a nacieco en Lincang-gubernio, ili povas nur respondi: “Mi naskiĝis en la jaro, kiam la domo estis forbruligita” aŭ “Mi estis naskita, kiam ĉi tie okazis superakvo.” Pro tio censistoj organizis “aĝotaksajn grupojn”, kiuj konsistis el lokaj kadroj kaj maljunuloj, kiuj ankoraŭ povas klare rememori la okazajojn. Ili kompilis lokajn kronologiajn tabelojn por helpi la popolanojn rememori naskiĝtagojn.

Ekzemple, iu maljunulo de la va-a nacieco en Lincang-gubernio diris, ke li estis naskita en la jaro, “kiam la vilaĝeto estis forbruligita, seka rizo estis plantita kaj la luno estis plena.” Konsultante la kronologian tabelon, la “aĝotaksa grupo” eksciis, ke la maljunulo naskiĝis meze de aprilo de 1923. Kun la konsento de la maljunulo, la naskiĝtago estis konfirmita kaj enskribita en la karton, kiu estis donita al la maljunulo por konservado.

Lusin (dekstre) kaj V.
Eroŝenko en Pekino, 1922



GE BAOQUAN*:

Amikeco inter Lusin kaj V. Eroŝenko

LA nomo de Vasiliĵ Eroŝenko (1889-1952), la rusa blinda poeto kaj verkisto, kiu verkis per Esperanto kaj la japana lingvo, ĉiam okupas gravan lokon en la historio de la esperanta literaturo. La 23-a de decembro 1982 estis la 30-a datreveno de lia forpaso. Kvankam multaj jaroj jam pasis post lia morto, tamen la de li verkitaj fabelaroj «Kanto antaŭ la Tagiĝo», «La Lasta Ĝemo», «Por la Homaro» kaj fabela dramo «Persikkolora Nubo» ne nur riĉigis la trezorejon de la esperanta literaturo, sed ankaŭ restas multe ŝatataj kaj legataj de diverslandaj esperantistoj hodiaŭ.

Eroŝenko estis bona amiko de la ĉina popolo kaj precipe de la ĉinaj esperantistoj. Kiam li vivis en Ŝanhajo en oktobro kaj novembro de 1921, li verkis

“malgrandajn fabelajn skizojn de ŝanhaja vivo” kaj prezentis ĝin al siaj ŝanhajaj amikoj kaj la suferanta ĉina popolo sub la titolo «Rakontoj de Velkinta Folio». La jaro 1982 estis la 60-a datreveno de lia vizito al kaj ekloĝado en Pekino kaj ankaŭ 60-a datreveno de la eldono de la «Kolekto de Fabeloj de Eroŝenko» kaj la fabela dramo «Persikkolora Nubo» tradukitaj de la granda ĉina verkisto Lusia. Kvankam tiuj signifoplenaj datoj estas hazarde en la sama jaro, tamen la profunda amikeco inter Lusia kaj V. Eroŝenko restos por ĉiam brila paĝo en la historio de la verkista amikeco inter Ĉinio kaj Rusio.

Antaŭ 20 jaroj mi verkis artikolon “Lusia kaj V. Eroŝenko”, kiu estis publikigita en ĵurnalo kaj gazeto¹. Dank’ alla studo


dum la lastaj jaroj kaj laŭ la 16-voluma «Kolekto de la Verkoj de Lusia» eldonita en 1981, ni trovis nemal multe da novaj materialoj pri la amikeco inter Lusia kaj V. Eroŝenko.

Lusia ne nur ŝatis la verkojn de Eroŝenko, sed ankaŭ estis la plej frua kaj plej grava tradukinto kaj koniginto de liaj verkoj en Ĉinio. Jam en aŭgusto kaj septembro de 1921 Lusia ĉinigis lian fabelon «Malvasta Kaĝo» kaj aperigis ĝin en la revuo “Nova Junulo”. Li skribis en la “Post Traduko” por tiu fabelo: “Post kiam Japanio ekzilis iun rusan blindulon la 28-an de majo, 1921, multa inko verŝiĝis pri tio en la japana gazetararo, kaj nur tiam mi ekatentis pri tiu migranta blinda poeto V. Eroŝenko.” El la letero al lia frato Zhou Zuoren, kiu publikigis antaŭ nelonge, mi informiĝis ke tiam li intencis ĉinigi kaj prezenti fabelojn de Eroŝenko. La 30-an de aŭgusto 1921 li akiris la fabelaron de Eroŝenko «Kanto antaŭ la Tagiĝo» en la japana lingvo, kaj en

la sama tago li skribis al sia frato Zhou Zuoren: "Hodiaŭ mi ricevis la verkon de la persekutita blinda poeto kaj ĝin sendas al vi por legi. Ĝia enhavo estas iom malkaŝema, sed bona. Ĝin mi ankoraŭ ne havis tempon atente legi. Mi ne trovis ĝin tiel danĝera, ke oni devis forpeli la aŭtoron kun bruego. Eble mi ĉinigos ĝin estonte." Lusin skribis en alia letero al sia frato la 4-an de septembro: "Mi ne atente legis la fabelojn de s-ro Eroŝenko, sed mi volas ĉinigi pli da ili, aŭ eldoni ilin aparte en la formo de libreto. Ĉar liaj verkoj estas facile kompreneblaj, ili eble estos utilaj al tiuj tre arogantaj sinjoroj." La 10-an de la sama monato li ĉinigis por "Feliĉtono de la Matena Ĵurnalo" alian fabelon de Eroŝenko «Sur la Bordo de Lageto» kaj skribis en la "Post Traduko": "Pro la socia sekureco Japanio forpelis iun rusan blindulon el sia lando en la komenco de majo kaj sendis lin al Haishenwai (Vladivostoko). Li estis neniu alia ol poeto V. Eroŝenko. Li fulme pasis el mia memoro, sed hodiaŭ mi hazarde vidis lian «Kanto antaŭ la Tagiĝo», kaj naskiĝis ĉe mi deziro nerezistebla por prezenti lian koron al la ĉinoj." Tio montris, kiel Lusin ekatentis Eroŝenkon kaj komencis traduki liajn verkojn.

Post sia ekziliĝo el Japanio, Eroŝenko veturis de la ekstremorienta regiono de Sovetunio al Harbin de nia lando en aŭgusto de la sama jaro. Li atingis Ŝanhajon en la komenco de oktobro kaj tie konatiĝis kun Hujucz², ĉina veterana esperantisto. Mi informiĝis de k-do Hujucz, ke li renkontis Eroŝenkon en iu masaĝejo, funkciigita de japano en la distrikto Hongkou, Ŝanhajo,

V. Eroŝenko en Pekino, 1922



kaj trovis ke la lasta parolas Esperanton tre bele. Tiam Eroŝenko vivis malfacile. Por lin helpi Hujucz ĉinigis liajn diktitajn versaĵojn kaj publikigis ilin en gazeto kaj petis lin instrui nian lingvon en la esperanta lernejo fondita de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Krome li verkis la artikolon «Pri Blinda Poeto Eroŝenko» kaj aperigis ĝin en la «Respublika Ĵurnalo».

Lusin ekrilatiĝis kun Eroŝenko eble en la komenco de novembro 1921. Li skribis en sia taglibro la 4-an de novembro: "Antaŭtagmeze mi ricevis la leteron de Hujucz." La sekvan tagon li skribis plue: "Antaŭtagmeze mi respondis al Hujucz." Kvankam tiuj du leteroj perdiĝis, tamen ni povas legi jenajn vortojn el la "Post Traduko" skribita de Lusin por la fabelo de Eroŝenko «La Malĝojo de Fiŝoj», la 10-an de novembro: "En la antaŭparolo de la aŭtoro de «Kanto antaŭ la Tagiĝo», Eroŝenko diris ke la du fabeloj «La Malĝojo de Fiŝoj»

kaj «La Koro de Aglo» ambaŭ estis verkitaj per malĝojo de la artisto mem. Mi intencis ĉinigi la antaŭan fabelon, tamen fine demetis mian plumon, kaj ĉinigis nur la lastan. Lastatempe s-ro Hujucz skribis al mi ke la aŭtoro mem trovas la fabelon «La Koro de Aglo» plej kontentiga por li kaj petis min unue ĝin ĉinigi. Tial mi pene tradukis ĝin." El tio ni povas scii, ke tiam Eroŝenko estis certa ke Lusin estas tradukanta liajn verkojn kaj proponis al li unue traduki «La Malĝojo de Fiŝoj».

La 1-an de decembro 1921 Lusin skribis en sia taglibro: "Vespere mi ricevis leteron de Shen Yanbing³ kaj rulon da artikoloj de Eroŝenko." Lusin tuj ĉinigis la fabelon de Eroŝenko «Incendio de la Mondo». Li skribis en la taglibro la 26-an de decembro: "Antaŭtagmeze mi ricevis la leteron de Hujucz kaj ekzempleron de «La Lasta Ĝemo», donacitan de V. Eroŝenko." El ĝi Lusin ĉinigis «Morto de Du Malgrandaj Knaboj».

Lusin diris: “La dua fabelaro de Eroŝenko «La Lasta Ĝemo» enhavas unu fabelan dramon kaj du fabelojn. «Morto de Du Malgrandaj Knaboj» estas la lasta en la kolekto kaj elektita de la aŭtoro mem por traduki.”

Kvankam Lusin kaj Eroŝenko jam havis rilaton inter si, tamen ili vidis unu la alian nur en la komenco de 1922. Multaj diras, ke Eroŝenko venis al Pekino la 24-an de februaro 1922 kaj tuj ekloĝis en la hejmo de Lusin kaj lia frato Zhou Zuoren en la Okcidenta Distrikto de Pekino. Sed post miaj enketado kaj esplorado dum la lastaj jaroj mi konstatis, ke post kiam Eroŝenko atingis Pekinon akompanate de la ĉina verkisto Zheng Zhenduo, li unue loĝis en la hejmo de Geng Jizhi, esploristo kaj tradukisto de la rusa literaturo, en la Orienta Distrikto de Pekino, kaj poste estis alkondukita de Zheng kaj Geng al la hejmo de Lusin kaj Zhou Zuoren. La lasta skribis en sia taglibro la 24-an de februaro: “La 24-a, neĝo, hela tago antaŭ la tagmezo. S-ro Eroŝenko venis en la akompano de s-roj Zheng Zhenduo kaj Geng Jizhi, kaj estis loĝigita portempe en la orienta ĉambro.” Li notis la 25-an en la taglibro: “Hela tago, ventego. Posttagmeze mi kune kun s-ro Eroŝenko iris viziti s-ron Cai Yuanpei en la Pekina Universitato.” El tio mi certigis ke V. Eroŝenko venis en Pekinon eble iom pli frue. La 24-a de februaro estis dato de lia transloĝiĝo en la domon de Lusin kaj lia frato, tiam Lusin loĝis en la antaŭa korto, dum Eroŝenko en la malantaŭa. Eroŝenko parolis flue la japanan lingvon krom la angla kaj Esperanto, pro tio estis tre oportune por li loĝi en la hejmo de Lusin

kaj lia frato, kiuj ambaŭ parolis la japanan lingvon, kaj li povis esti bone zorgata de ili. De tiam komenciĝis la amikeco inter Lusin kaj Eroŝenko.

Komence de 1922 Lusin finis la tradukon kaj redaktadon de «Kolekto de la Fabeloj de Eroŝenko», kiu estis eldonita de la Komerca Eldonejo julie de la sama jaro. En aprilo kaj majo, helpate de Eroŝenko mem, Lusin komencis traduki lian dramon «Persikkolora Nubo», kiu estis publikigita parton post parto en la “Feliĉtono de la Matena Ĵurnalo” kaj eldonita julie de la Eldonejo Xinchao, Pekino. Lusin diris en la antaŭparolo: “La aŭtoro deziris ke mi pli frue ĉinigu la dramon «Persikkolora Nubo», ĉar li mem opinias ĝin pli bona ol la antaŭaj verkoj, kaj volis pli frue prezenti ĝin al la ĉinaj gejunuloj.” La 3-an de julio 1922, Eroŝenko forlasis Pekinon kaj veturis tra Moskvo al Finnlando por ĉeesti la 14-an Universalan Kongreson de Esperanto en Helsinko. La 5-an de julio Lusin ĉinigis lian novan fabelon «La Tragedio de Kokido». La 4-an de novembro, Eroŝenko revenis Pekinon. Nelonge antaŭ tio, Lusin kun sopiro al Eroŝenko verkis la novelon «La Komedio de Anasoj». La 16-an de aprilo

1923 Eroŝenko adiaŭis Pekinon kaj veturis al Sovetunio. La «Kolekto de Fabeloj de Eroŝenko» kaj fabela dramo «Persikkolora Nubo», ĉinigitaj de Lusin, estas ne nur valoraj literaturaj verkoj postlasitaj de li al Ĉinio, sed ankaŭ kristalo de la profunda amikeco inter Lusin kaj tiu blinda poeto.

* La aŭtoro estas fama ĉina esploristo pri la fremdlanda literaturo, tradukisto kaj prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio.

1) La artikolo estis publikigita unue en la ĵurnalo «Lumo» la 18-an de okt. 1961, kaj poste en n-ro 6 de «El Popola Ĉinio».

2) Hujucz nun estas prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Li tradukis la verkon de Eroŝenko «Rakontoj de Velkinta Folio» kaj kompilis alian lian libron «Ĝemo de Unu Soleca Animo».

3) Shen Yanbing (1896-1981), kiu havis plumnomon Mao Dun, estis fama ĉina moderna verkisto. Tiam li estis ĉefredaktoro de la monata gazeto «Xiaoshuo Yuebao».



Verkoj de Eroŝenko ĉinigitaj de Lusin kaj Hujucz



ĈINIO TELEVIDIGIS PROGRAMERON PRI ESPERANTO


Vespere de la 18-a de oktobro 1982 la Centra Televida Stacio de Ĉinio sendis programeron kun la titolo "Esperanto en Ĉinio" por diskonigi la devenon kaj evoluon de Esperanto, la ĉinan Esperantomovadon kaj ĝian nunan staton. En la programero oni vidis ankaŭ, ke raportisto de la televida stacio intervjuas s-ron Chu Tunan, membron de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanton de "Amikoj de Esperanto". S-ro Chu montris, ke kiel lando kun longa historio kaj bona literatura heredaĵo, Ĉinio devas kontribui al la paco kaj progresema kultura afero de la homaro, kaj disvastigo de Esperanto estas nepre necesa.

RAPORTA KUNVENO PRI VIZITO AL JAPANIO

La 20-an de oktobro 1982 la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis en Pekino kunvenon, en kiu s-ro Laŭlum, la estro de la Delegacio de Ĉina Esperanto-Ligo, raportis pri la vizito al Japanio. Laŭ invito de la Japana Esperanto-Instituto la delegacio kun tri membroj partoprenis en la 69-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj kaj vizitis Tokion, Nagojon, Kioton kaj aliajn japanajn urbojn. La kunvenantojn interesis la japana Esperantomovado kaj ĝojigis la amika akcepto al la delegacio.

GUANGMING RIBAO INFORMIS PRI LA 67-A UK

La 7-an de oktobro 1982 la ĉina influa porintelektula ĵurnalo Guangming Ribao (Lumo) aperigis la artikolon "Forigi la Lingvan Baron, Plifortigi la Amikecon inter la Popoloj", verkitan de Li Guoqing, raportisto de la nomita ĵurnalo al Bruselo. La artikolo traktis la historion de UK kaj informis pri la 67-a UK kaj la aktivado de la



Partoprenantoj de la kongreso de la Lingva Instituto de Fujian

Ĉina Esperanto-Delegacio dum la kongreso.

LA LINGVA INSTITUTO DE FUJIAN-PROVINCO FAVORAS AL NIA LINGVO

En la aŭtuno de 1982 la Lingva Instituto de Fujian-provinco okazigis en Universitato de Xiamen sian unuan kongreson, dum kiu ĝi speciale aranĝis raportan kunvenon pri Esperanto. En la kunveno iuj filologoj kaj lingvistoj donis parolojn favorajn al nia lingvo. En la kongreso tri esperantistoj estis elektitaj kiel konsilantoj de la instituto.

ESPERANTO EN DIVERSAJ LOKOJ DE ĈINIO

Oktobre de 1982, en la Changji-a Huj-nacieca Aŭtonoma Subregiono en Xinjiang en nordokcidenta Ĉinio, ekfunkciis porinstruista Esperanto-kurso, kiu daŭros duonjaron. La kurso havas dudek lernantojn, kiuj lernis la lingvon en koresponda Esperanto-lernejo. La kurso metos fundamenton por fondi Esp-asocion en la subregiono.

En kvar urboj kaj dek kvin gubernioj de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono en suda Ĉinio troviĝas studrondoj, inter kiuj la studrondo en Liuzhou, kun pli ol 200 homoj, komencis disvastigi kaj lernigi la lingvon en la urbo.

Krome, pliaj Esperanto-kursoj aperis en Wuhan, Huangshi, Shenyang, Fushun, Anqing, Wuhu, Zhenjiang, Quanzhou kaj aliaj urboj.

INTERNACIA MEMORKUNVENO "IVAN FLANJAK"

Dum la 18-20-a de marto, 1983 en Osijek, Jugoslavio okazos la unua internacia memorkunveno por omaĝi IVAN FLANJAK, forpasintan diligentan membron de E-societo "Liberiga Stelo". La temo de la kunveno estos "Ĵurnalismo kaj literatura kreado en Esperanto". Referaĵojn kaj aliĝojn sendu al: Esp. Societo "Liberiga Stelo", P.P. 27. 54000 Osijek, Jugoslavio.

PLUA INFORMO PRI INTERKOMPUTO-82

Ĝis la 5-a de septembro, al INTERKOMPUTO-82 oni jam anoncis 73 prelegojn el 14 landoj, eĉ el Ĉinio kaj Jordanio. La aŭskultantaro ankaŭ estas multnombra, ekzemple nur el FR Germanio jam 50 personoj pagis la partoprenkoston. El 16 landoj jam aliĝis gastoj, inter ili estis iuj el USONO.

Dum INTERKOMPUTO-82 estos granda ekspozicio. El eksterlandaj ekspoziciantoj menciindas la bulgara kaj polaj eksterkomercaj entreprenoj, sed ĝin partoprenos pli ol 20 el bazaj hungaraj prikomputadaj firmaoj. Sur la ekspoziciaj tabuloj ĉio estos skribita en la internacia lingvo. La ekspozicio estos "viva", kun funkciaj komputiloj.

Al INTERKOMPUTO-82 sendos reprezentanton M. Mili, ĉefkunordiganto de Monda Komunikajaro. Laŭ la decido de UEA-estraranoj, tiu simpozio estos la komenco-pun-

Naskiĝotago de sinjorino Maria

de WANG JINBO

SURVOJE al la Somera Palaco, alilandaj turistoj scivole¹ rigardas eksteren tra vitro de la aŭto kaj senĉese faras demandojn kun ĝojo kvazaŭ viglaj knaboj.

Kiel gvidisto² mi klarigas al ili apudvojjajn konstruojn kaj vidindajn lokojn:

“Jen Tian’anmen-pordego. Post ĝi estas la Imperiestra Palaco.”

“Jen Xidan, unu el la movople-naj komercaj kvartaloj³ de Pekino.”

“Jen la Besta Ĝardeno. Tie vi povas vidi grandajn pandojn⁴ kaj orharajn simiojn. . .”

Unu el la gastoj ekkantis gratulan kanton por naskiĝotago, dum alia salutas per manpremo iun maljunulinon. Kiu ŝi estas? Ŝi estas Maria,

60-jara solulino.

Kiu devas zorgi pri ŝia naskiĝotago? Ŝi gastas ĉe ni, kompreneble, mi devus esti ŝia proksimulo. Sed kion mi faru por tio? Mi pensis kaj pensas, kaj venas al mi en la kapon bona ideo: Laŭ la ĉina moro mi regalus ŝin per “longvivaj vermiĉeloj”.

Vizitante la ĉarman Someran Palacon, la turistoj eniris en restoracion. Mi sciigis mian penson al la ĉefkelnero⁵.

Post la lasta plado oni alportis bovlon da ĉinaj vermiĉeloj. Vidinte tion, ĉiuj turistoj ekmiris. Je tio mi stariĝis kaj diris: “Gesinjoroj, hodiaŭ estas la naskiĝotago de sinjorino Maria. Por festi tiun ĉi tagon, laŭ nia moro, mi proponas

al vi ĉinajn vermiĉelojn, kiuj simbolas longvivecon kaj feliĉon. Nun ni ĝuu la manĝaĵon kaj per tio festu ŝian naskiĝotagon.” Tuj post tiuj vortoj aŭdiĝis aplaŭdoj. La maljunulino kortuŝiĝis ĝis larmoj. Prenante mian manon ŝi diris: “Ankoraŭ en mia juneco mi songis jam pri vizito al Ĉinio. Nun mi tre ĝojas pro efektiviĝo de mia deziro. Sed estas ekster mia supozo, ke oni festas mian naskiĝotagon en Pekino. Dankon al vi, dankon al ĉinaj amikoj!”

Novaj Vortoj

1. sci-vola: tre ema ekscii.
2. gvid-isto: persono, kiu profesie gvidas dum ekskursado.
3. kvartalo: parto de urbo, prezentanta ian specialecon de funkciado aŭ de loĝantaro.
4. Pri ili ni jam aperigis artikolon kaj foton sur nia gazeto, n-ro 7 de 1982, p. 38.
5. ĉef-kelnero: tiu, kiu gvidas kaj kontrolas la kelnerojn de granda restoracio.

kto de la jubilea kvinjara agado por festi la centjariĝon de la internacia lingvo. Ankaŭ la sekva kunveno de Internacia Asocio de E-istaj Matematikistoj okazos dum INTER-KOMPUTO-82.

TURISMA INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO

Komisiite de UNUIĜO FRANCA por ESPERANTO s-ro Robert LLORENS, U. E. A. fakdelegito pri turismo, organizos Turisman Internacian Esperanto-Semajnon de la 25-a de junio ĝis la 2-a de julio 1983 en Cannes ĉe la lazura marbordo en Francio. Koresponda adreso: Internacia Esperanto-Semajno, “LES HORTENSIAS 2”, DOMAINE DES FLEURS, 121 bis BOULEVARD NAPOLEON III, F-06200-NICE.

KUNVENO POR AMIKECO INTER POPOLOJ

De la 21-a ĝis la 29-a de aŭgusto, 1982, en la urbo Rimini en norda Italio okazis la tria kunveno por amikeco inter la popoloj, kiun ĉeestis pli ol 300 000 gejunuloj. En la ekspozicio de la libro estis originalaj kaj tradukitaj verkoj en Esperanto kaj Esperanto-gramatikoj en diversaj lingvoj. A.Ciccanti, pastro kaj prezidanto de U.E.C.I. kaj d-ro Luigi Tadolini, delegito de I.E.F. prezentis prelegojn pri “Esperanto: rimedo de l’ homo por la dialogo inter la popoloj”. Ĉiam pli montriĝas ke ĉi tiu kunveno estas granda okazo por renkontiĝo inter personoj el diversaj landoj, kulturoj, ideologioj, kiuj havas komunan pa-

sion por la homo kaj lojalecon por la vero.

ESPERANTO-RUBRIKO EN ITALA REVUO

Dum la Ĝenerala Asembleo de Itala Esperanto-Federacio okazinta la 20an de sept. 1982 en Forte dei Marmi (Italio) oni informis, ke sino MARIA AULIZIO, konata pentristino kaj direktorino de “RIVIVERE” (monata revuo pri scienco, arto kaj kulturo), akceptis la proponon krei en sia revuo rubrikon dediĉatan al Esperanto. D-ro Luigi Tadolini ne nur faris la proponon, sed ankaŭ prenis al si la taskon pri daŭra tutpaĝa (grandformata) Esperanto-rubriko. La n-ro 10 de la revuo 1982 gastigis lian unuan artikolon.



Arbaraj zonoj ĉe ambaŭ bordoj de la rivero Cangtou

HUANG CHUANTI:

Youyu—oazo apud la Granda Muro

LA regiono Yanbei en Shanxi-provinco sin trovas ekster la pasejo Yanmen apud la Granda Muro en la norda Ĉinio, tial oni nomas ĝin Altebenajo apud la Granda Muro. En Ĉinio je mencio de la regiono, oni nature ekpensas pri dezerta loko plena de sablovento kaj sekegeco. Sed nun ĝi jam aliĝis.

Printempo venas multe pli malfrue al tiu regiono ol al la suda parto de Ĉinio, eĉ je unu monato malpli frue ol al Pekino. Tamen la regiono en frua printempo estas alloga, kaj min plej interesis kaj plej profunde impresis la tieaj arboj: la kontraŭventa forstozono etendiĝanta kelkcent kilometrojn laŭlonge de la Granda Muro, la densaj arbaroj protektantaj la bordojn de Sanggan-rivero, la kvadrataj arbar-retoj borderataj de la forstozonoj, la arboj kovran-

taj la valojn kaj montdeklivojn, la rapidkreskaj arbaroj kaj arbidaj bedoj. La verdajoj, kulturitaj de la tiea popolo, ŝanĝas la fizionomion de la altebenajo, alportante al ĝi printempon kaj esperon.

La naturaj kondiĉoj de la regiono Yanbei estis la plej malbonaj en la provinco kaj tiuj de la gubernio Youyu—la plej malbonaj en la regiono. Vento furiozis la tutan jaron, de printempo ĝis vintro. En la sezono de printempa semado la semoj kune kun la surfaca grundo ofte forportigis de ventego. La blovo faris la ĉielon tiel malhela, ke oni devis bruligi lampon eĉ en tago. La malnova gubernia urbo de Youyu estis konstruita en Ming-dinastio (1368-1644). La urbomurego alta je dek du metroj estis antaŭlonge glutita de sablo. Laŭ sabla deklivo mi sup-

reniris la muron. Ne malproksime de la malnova urbo estas Shahukou, grava pasejo de la Granda Muro. Ekster la pasejo sterniĝas la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. La vojevdisto diris al mi: “En la historio ĝi estis strategia loko en milito, kiun la du batalantaj flankoj volis okupi. La militado ege detruis la ekologian ekvilibron. Antaŭvespere de la Liberiĝo nur 0.3% de la gubernia areo estis kovrita per arboj. Sablovento, sekegeco, frostoj kaj hajlo faris la gubernion sterila.”

Nun antaŭ miaj okuloj aperis bonordaj kampoj kaj aŭtoj plensarĝitaj per gagatnigra karbo sur asfaltita ŝoseo, kiuj veturas tra la pasejo al la Interna Mongolio. Oriente de la pasejo etendiĝas longa kontraŭventa arbara zono laŭlonge de la antikva Granda Muro, kiu kune kun tiuj de la gubernioj Pinglu, Zuo-yun kaj Yanggao formis grandan verdan muron. Dum la pasintaj tridek jaroj oni starigis en la gubernio Youyu dek tri grandajn kaj okdek unu mezgrandajn forstozonojn kaj ses grandajn arbarajn regionojn kaj per tio forstigis pli ol 64 000 hektarojn da tero, t.e. 30% de la areo de la gubernio, kaj reguligis la ekologian ekvilibron. La rapideco de vento malgrandiĝis kaj la nombro de sabloventaj tagoj reduktiĝis je duono. De 1975 ĝis nun, neniam blovis sablovento. Malpliigis frostaj kaj hajlaj tagoj, dum pliiĝis pluvokvanto. En la gubernio oni bridis la grundan erozion en pli ol 66 000 hektaroj da kampoj.

La rivero Cangtou estas la plej granda en la gubernio. Antaŭe la rivero inundis vastajn kampojn dum la pluva sezono.

Sed hodiaŭ ambaŭborde de la rivero etendiĝas arbaraj zonoj de poploj, hipofaĵoj (*hippophae rhamnoides*) kaj salikoj kaj kreskas grenplantoj kaj paŝtaj herboj. Tie vivas dekoj da specoj de bestoj kaj birdoj, kiel vulpoj, leporoj, fazanoj, pigoj kaj ruĝkruraj fazanoj. Somere sovaĝaj anasoj naĝas en la rivero.

Ne sole arbaroj prosperis, sed ankaŭ grenoj plimultiĝis kun ĉiu jaro. En 1981 la gubernio suferis malvarman veteron kaj seriozan sekegecon, tamen la totala grena produktokvanto atingis 28.5 milionojn da kilogramoj. Antaŭe en la gubernio ne estis fruktaroj, kaj la infanoj frandis nur hipofaajn fruktojn. Nun tie en kvindek produktaj briga-

doj aperis fruktoĝardenoj, kie oni kulturas pirarbojn,abrikot-arbojn, pomarbojn kaj vinberujojn.


Oni batalis kontraŭ la naturo kaj akiris la sukcesojn. Jen ekzemplo en Huangshawa.

Huangshawa en la ĉina lingvo signifas lokon de sablo. Ĝi estas dek kilometrojn longa kaj kvar kilometrojn larĝa. La ventego etendis la sablejon al la vilaĝoj 1.5-2 metrojn ĉiujare. En 1956 la loĝantoj de la gubernio ekbatalis kontraŭ tio. Sed la unuaj arbidoj, kiujn ili plantis, havis malbonan sorton. Iuj el ili estis forblovitaj de vento, aliaj glutitaj de sablo, kaj triaj fariĝis sekaj kun nuda trunko. Sed la loĝantoj ne senkuraĝiĝis. Ili resumis la sperton kaj alprenis di-

versajn rimedojn. Post multaj provoj ili fine sukcesis kreskigi verdajn estaĵojn sur la sablejo. Mi vidis nemalmultajn poplojn sur montodeklivo kies radikoj kiel kokaj fingroj sin tenis forte je la grundo. Sur sablo kreskis poplo preskaŭ ok metrojn alta. La grundo sur ĝiaj radikoj estis forblovita de vento. Parto de la radikoj eniĝis porfunde en la teron, kaj la alia parto etendiĝis orienten al sabla monteto. 23 radikoj estis malkovritaj, kaj la plej longa el ili atingis eĉ du metrojn. Kiel dignoplana bravulo la poplo staris firme sur sia pozicio spite la sabloventon. Sur alia montodeklivo multaj arboj estis kovritaj de sablo, tiel ke montriĝis nur ilia kapo, tamen ili estis plenaj de viveco. Ili sin defendis kontraŭ sablovento per profunda enradikiĝo. Kiam ili kovriĝis de unu tavolo da sablo, ili elkreskigis unu tavolon da radikoj. Ju pli dikiĝas la kovranta sablotavolo, des pli firme staras la arboj. Ili ĉiam tenas sian kreston super la sablo. Nun en Huangshawa oni forstumis pli ol 1 400 hektarojn da tero per poploj kaj per tio bridis la flusablon.

La iom-post-ioma dezertigo de la terglobo serioze minacas la homaron. Venki sekegecon kaj transformi dezerton estas problemo esplorata de multaj landoj. En la internacia konferenco pri dezerto okazinta en Japanio en 1981, la ĉina forstologia profesoro Yang Hanxi raportis pri la forstumado de gubernio Youyu kaj vidigis televizian filmon pri tiu loko, kio vekis grandan intereson de la kunvenantoj. Jes, ĝuste kiel la sperto de Youyu montris, la homaro estas tute kapabla batali kontraŭ la naturo.

Prosperaj plantoj sur la antaŭe inunditaj kampoj ĉe la bordo



La ĉina aviada industrio en disvolviĝo

EN la pasintaj pli ol 30 jaroj la ĉina aviada industrio akiris rimarkindajn progresojn. Ĉe sia fondiĝo la nova Ĉinio nur povis ripari aviadilojn de iuj specoj kaj poste imitis alilandajn aviadilojn en la produktado. Nun ĝi komencis mem projekti aviadilojn. Ĝi havas nombron da scienc-esploretoj kaj teknikistoj kun certa nivelo kaj kompletan sistemon de aviada industrio, kiuj jam faris kontribuojn al nia ekonomia kaj naci-defenda konstruado.

Jam en 1954 Ĉinio sukcese provfaris la unuan aviadilon. Post du jaroj la ĉina aviada industrio faris grandan paŝon antaŭen per produktado de sia unua batal-jeto. En la sesdekaj jaroj Ĉinio sukcese konstruis nombron da gravaj aviadaj entreprenoj kaj posedis teknikon produkti piŝtajn aviadilojn kaj jetojn, ankaŭ kies materialoj kaj maŝinpartoj plejparte estis produktitaj de Ĉinio mem.

Samtempe kun tio, Ĉinio starigis siajn aviadajn scienc-esploretojn kaj projektajn instituciojn. Ili kaj koncernaj fabrikoj fabrikis atakaviadilojn, altrapidajn atakaviadilojn, altrapidajn batalaviadilojn, portrejnajn kaj transportajn aviadilojn kaj aliajn militajn kaj civilajn aviadilojn. Krome, la ŝtato ankaŭ fondis la Pekinan Aviadan Instituton, la

Nordokcidentan Industrian Universitaton kaj la Nankinan Aviadan Instituton, kiuj elkulturis grandan nombron da fakuloj por la aviada industrio.


Dekomence Ĉinio tre atentis la disvolvon de la civila aviada industrio. Frue en 1957 Ĉinio provfabrikis malgrandan pluruzan civilan piŝtan biplanon Yun-5 kaj komencis pogranda produktadon. La biplano estis vaste uzata en pasaĝera kaj vara transportado, ŝprucigado de insekticido, semado, sterkado, arbora protektado, artefara pluvado, geologia prospektado kaj aliaj. Ĝi siatempe estis la ĉefa speco de ĉinaj aviadiloj por specialaj uzoj.

En 1975 Ĉinio komencis projekti alispesan malgrandan pluruzan monoplanon Yun-11 kaj post du jaroj komencis produkti tiajn monoplaneojn. Dum la lastaj jaroj ili servis al agrikulturo, paŝtado kaj aviada esplorado en multaj lokoj. Ili estis bonvenaj pro siaj facila leviĝo kaj malleviĝo kaj bona funkciado, krome, ĝi kun malgranda korpo povas flugi super la tero je 5-10 metroj.

Por kompletigi la serion de transportaj aviadiloj la ĉinaj aviadaj institucioj provfabrikis aviadilon Yun-11-T. La unua tiuspeca aviadilo sukcese provflugis en julio 1982. Ĝiaj korpo, funkcio kaj ŝarĝpovo estas multe pli idealaj ol tiuj de la aviadilo Yun-11.

Alia tipo de civila aviadilo — pasaĝera aviadilo Yun-7, mezkaj mallong-distanca, komencis produktiĝi malgrandnombre en julio 1982. Ĝi povas veturigi 48 pasaĝerojn, ĝia plej granda hora krozrapideco estas 478 kilometroj, ĝia plej longa fluga distanco 1900 kilometroj, ĝia plej granda ekfluga pezo 21 tunoj.

Pasaĝera aviadilo Yun-7





Monoplano Yun-11

Dank' al apliko de novaj teknikoj kaj uzo de novaj materialoj en la struktura projekto de ĝia motoro, tia aviadilo havas bonan veturpovon kaj povas normale flugi en temperaturo de 30°C sub la nulo ĝis 40°C. Ĝia motoro povas facile starti eĉ en temperaturo de 20°C sub la nulo.

Ĉinio komencis malgrandnombre produkti mezgrandan transportan aviadilon Yun-8 en 1979. Ĝi povas ŝarĝiĝi per 20 tunoj da varoj kaj ĝia plej granda ekfluga pezo estas 61 tunoj. Ĝia horokrozrapideco estas 515 kilometroj kaj ĝia plej longa fluga distanco 5 463 kilometroj.

En 1958 Ĉinio provfabrikis sian unuan helikopteron Zhi-5, kiu estis vaste uzata en transportado de varoj kaj gravaj malsanuloj, en agrikulturo kaj arbara protektado. Por rapide altigi la teknikon de helikoptera fabrikado, Ĉinio kontraktis kun Francio en 1980 pri enkonduko de la helikoptero "Delfeno" kaj tekniko fabriki ĝian motoron. Nun Ĉinio estas muntanta la unuan grupon da helikopteroj Zhi-9 (la ĉina tipo de "Delfeno").

En la lastaj jaroj Ĉinio praktikis malferman politikon, la eksporta kvanto de produktaĵoj de la ĉina aviada industrio kreskis senĉese. En 1979 fondiĝis en Pekino la Ĉina Importa kaj Eksporta Kompanio de Aviada Tekniko. En la Kantona Foiro en la aŭtuno de tiu jaro, la civilaj aviadiloj kaj aviadaj maŝinpartoj eksponitaj de la kompanio altiris al si atenton de eksterlandaj komercistoj. Ĝi estas sendependa kompanio, kiu entreprenas eksportadon de aviadaj kaj nea-

Aviadiloj por instruado en la Pekina Aviada Instituto





Aviadilaj maŝinpartoj fabrikitaj de Ĉinio, eksponataj en la Internacia Industria Foiro de Hanovro FRG, en aprilo 1982

aliaj landoj. Ĝi kontraktis sinsekve kun la Komerca Aeroplana Kompanio Boeing, la Aeroplana Kompanio Douglas, la Kanada Aeroplana Limigita Kompanio Pratt kaj Whitney, la Kanada Aeroplana Limigita Kompanio, la Brita Aerospaco, la Aeroplana Fakoj de la Limigita Kompanio Rolls-Royce kaj la Limigita Kompanio de la Fratoj Shrot pri prilaborado de aviadilaj maŝinpartoj. La Xi'an-a Aviadila Kompanio kaj la Ŝanhaja Aviadila Fabriko ricevis laŭdojn de la usonaj kompanioj Boeing kaj Douglas pro la bona kvalito de la prilaboritaĵoj.


En la pasintaj pli ol 30 jaroj la ĉina aviada industrio akiris kompare grandan progreson. Sed ĝi ankoraŭ devas iri longan vojon por atingi la mondan avangardan nivelon en tio. Kun senĉesa disvolviĝo de la moderniga konstruado, la ĉina aviada industrio havos pli grandan progreson.

viadaj produktaĵoj de la fabrikoj sub la Aviada Ministerio, enkondukas alilandajn avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn, faras teknikan interŝanĝon kun aliaj landoj kaj petas konsilojn. En la pasintaj pli ol tri jaroj produkta-

ĵoj de la ĉina aviada industrio vendiĝis al pli ol 50 landoj kaj regionoj.

Krom eksporti produktaĵojn, la ĉina aviada industrio kun relative granda produkta povo ankaŭ akceptas prilaboradon por

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. La gubernio Youyu
3. Jining
4. Weishan-lago
5. La monto Sanqing
6. Changchun
7. Henan-provinco
8. Hubei-provinco
9. Shaanxi-provinco
10. Yunnan-provinco
11. Kashi
12. La Tibeta Aŭtonoma Regiono

La ĉina aviada afero en disvolviĝo

Fotoj de CHEN CHANGFEN
kaj WANG ENPU

Dum la lastaj jaroj Ĉinio rimarkinde pliigis la totalan longecon de la aernavigaj linioj, levis sian transportan kapablon, plimultigis la nombron de la aviadiloj kaj plibonigis la instalaĵojn por siaj flughavenoj. Nun Ĉinio havas 207 internaciajn kaj enlandajn aerliniojn kun totala longeco de pli ol 370 000 kilometroj. Ĝi kontraktis kun 43 landoj pri aernavigado, starigis profesiajn rilatojn kun pli ol 180 aviadaj kompanioj kaj funkciigas regulan flugadon al ĉirkaŭ dudek landoj kaj regionoj.

Ĉinio donis grandan atenton al sekureco de sia aernavigado. La ĉinaj aviadistoj, bone trejnitaj, ĉiuj trapasis la ekzamenon. Nemalmultaj el ili sekure flugis pli ol 10 000 horojn. La ĉinaj flughavenoj havas modernan manovrosistemon por la sekura ekflugo kaj alteriĝo de aviadiloj.


Krome, la ĉina aviada afero servas ankaŭ al forstumado, semado, sterkado, mezurado, fotado, mineja prospektorado kaj surmara nafto-kolektado.



Konduktoro servas al pasaĝeroj.

Flughaveno en Pekino






Gvidturo en la flughaveno

La elirejo de la flughaveno



**Radaro por se-
kurigi alteriĝon**



**Kontrolo de
aviadilo**



**La nova flughaveno de Simao en
Yunnan-provinco**





Aviadilo ŝprucigas insekticidon.



**Aernaviga servo starigita de la Ĉina Civila
Aviada Administracio en San-Francisko, Usono**



Yuan Jingquan

FACILE malsaniĝas la maljunuloj. Iuj el ili ekprenas taŭgajn medikamentojn, aliaj ekatentas sian nutraron, dum pli kaj pli da tiuj en Pekino partoprenas en sportado, opiniante, ke tio estas pli grava rimedo por longigi la vivon.

Kvankam mankas sportejo aparte por maljunuloj, tamen ĉie en la urbo troviĝas lokoj por ilia korpo-ekzercado. En promenejoj ĉirkaŭitaj de verdaj arboj, en arbaroj ambaŭflanke de stratoj, sur libera spaco apud altaj domoj kaj en grandaj parkoj, ili arope kaj diversmaniere faras sportadon laŭ siaj fiziologiaj ecoj. Iuj faras la gimnastikan ekzercon tajĝiĉjuan karakterizitan per mildaj kaj malrapidaj movoj, aliaj sin ekzercas en luktarto aŭ skermas, triaj promenas aŭ malrapide kuras. Ankaŭ iuj grandaĝaj maljunuloj eliras el la domo por etendi siajn brakojn kaj gambojn kaj enspiri freŝan aeron.

Tajĝiĉjuan estas sporto ŝatata de ĉinaj maljunuloj. Nun en Pe-

XIAO REN:

Kiamaniere ili longigas sian vivon?

kino troviĝas pli ol 160 instruaj stacioj de tajĝiĉjuan. Antaŭe, post ilia fondiĝo, la urba sporta institucio sendis al ili instruistojn. Poste, kun disvolviĝo de tiu sporto, oni fondis pli da instruaj stacioj kaj elektis instruistojn el la lertuloj por la nove fonditaj stacioj.

Por trimonata lernado ĉiu lernanto devas pagi ĉ. 0.5 juaĉon por sia lernomaterialo kaj rekompenco al la instruistoj. Tamen nemalmultaj senpage instruas, rifuzante la rekompencon.


Inter 5:00 kaj 6:30 ĉiutage funkcias la instruaj stacioj de tajĝiĉjuan. Ĝenerale, oni lernas tajĝiĉjuan en stacio proksime de sia hejmo aŭ sia oficejo antaŭ ol iri labori. Fininte la trimonatan lernadon oni laŭplaĉe elektas lokon por fari tian gimnastikon. Post la fondiĝo de

la stacioj en 1974, tajĝiĉjuan populariĝis inter maljunuloj, malfortuloj kaj malsanuloj.


En la Instrua Stacio de Xijiekou en la Okcidenta Distrikto de Pekino, mi vizitis la 60-jaran Li Yanfang, ĝian gvidanton kaj instruiston. Tiu emerita instruistino de elementa lernejo havis vizaĝon sanan kaj mienon gajan. “Kial vi ekzercas vin per tajĝiĉjuan?” mi demandis. “Ĉar mi estas malsana,” ŝi ridetis. Sed ŝiaj vortoj, ŝia aspekto kaj ŝia humoro apenaŭ povis kredigi min, ke antaŭe ŝi suferis plurajn malsanojn.

En 1973 ŝi malgrasiĝis tagon post tago kaj senhariĝis pli-ol-duone, ŝi falis en sendormecon kaj perdis la apetiton. Doktoro konstatis, ke ŝin trafis pulma

(Daŭrigo sur p. 25)



Li Yanfang



LI PING:

Komponisto kaj liaj komponaĵoj

IUN vintran posttagmezon, mezaĝulo kun okulvitroj staris antaŭ la pordo de elementa lernejo de la urbo Changchun. Li kun profunda sento rigardadis la malnovtipan konstruaĵon, demetis la ĉapon, karesis la hararon kaj supreniris laŭŝtupare al la oficejo de la lernejestro.

Li estas komponisto Wang Liping. Li multe sukcesis fari komponaĵojn por filmoj kaj popolamasaj kantoj kaj pro tio plurfoje ricevis premiojn kadre de la lando. Li estas unu el la komponistoj ŝatataj precipe de junaj muzikamantoj.

Lastatempe li revenis al sia hejmloko forlasita antaŭ multaj jaroj, por surbendigi siajn komponaĵojn por iu rakonta filmo en kunlaboro kun la muzikista trupo de la Changchun-a Filmstudio. En libertempo li venis al la lernejo, kie li lernis en sia infaneco. Akompanate de la lernejestro, li vizitis klasĉambrojn kaj ludis siajn verkojn por la infanoj, sur la piano, kiun li ludis siatempe. Bedaŭrinde, lia antaŭa muzika instruisto jam forlasis la

lernejon kaj laboris en alia loko. Li ne havis tempon viziti la instruiston, tial li petis iun transdiri lian sopiron al li.

En la sekvanta tago, iu vizitanto subite aperis antaŭ Wang Liping en la surbendigejo de la studio.

“Instruisto Liu, estas vi!” Wang Liping ekstuporis kaj tuj kaptis lian manon. Sin turninte, li laŭte diris al la famaj reĝisoroj, la direktanto kaj membroj de la muzikista trupo: “Li estis mia instruisto, mia muzika instruisto!”

Ĉirkaŭate de la respektaj rigardoj de tiuj famuloj, instruisto Liu povis nenion diri pro emocio. Li sin okupis pri edukado pli ol 30 jarojn, sed neniam pensis pri tia honoro. Nun li tre ĝojis pro la sukceso de sia lernanto.

Rememorante siajn travivaĵojn, Wang Liping ofte trovis, ke liaj intereso kaj konduto estas preskaŭ samaj kiel tiuj de la patro.

Somere de 1941 li naskiĝis en Changchun. Lia patro instruis muzikon kaj bone ludis bambuan fluton kaj dukordan muzikilon. Wang Liping kreskis en tia muzika medio.

En sia 9-jara aĝo Wang Liping eklernis ludi pianon. Post nelonge li fariĝis direktanto de la ĥoro de sia lernejo. Li estis severa al la ĥoranoj, tamen tenis intimajn rilatojn kun ili.

En la somero de 1954, Wang Liping, kiel membro de la Delegacio de Ĉinaj Junpioniroj, partoprenis en la Internacia Somera Kampado en Hungario. La infanojn tre interesis la kampafajro, pikniko kaj longa promenado ĉe la lago Balatono kaj en densa arbaro, kie batalis kontraŭfaŝistaj partizanoj. Ili ripetadis du vortojn en malsamaj lingvoj: “amikeco” kaj “estonteco”. Wang Liping aliĝis al la fotografia grupo dum la kampado. Li rimarkis, ke momenta fotado same kiel momenta ludo de muzikaĵo donas ian misteran kaj eternan forton.

Revenvoje al sia patrolando, Wang Liping kaj liaj kamaradoj restis mallonge en Moskvo. Profundan nokton ili venis al la Ruĝa Placo por aŭskulti batojn de la horloĝo de Kremlo. Ekbatis la horloĝo, kaj la infanoj, brako en brako, emocie streĉis la orelojn.

“Pri kio ni pensas nun?” mallaŭte demandis iu knabino. Ili varme interparolis pri siaj revoj, sed nur Wang Liping silentis. Li pensis en si, ke lia resonado eble estonte restos en la muzika kampo . . .

Poste Wang Liping vizitis la knaban klason de konservatorio. Tamen li ne volontis ludi komponaĵojn de aliaj, sed deziris mem komponi ion. La instruisto admonis, ke li bone lernu pian-

ludon. Sed li preteratentis liajn vortojn rigardante tra la fenestro elektrajn fadenojn similajn al muzika liniaro kaj birdojn sur ili similajn al muzikaj notoj.

Kiam li estis 16-jara, li komponis baladon, kio vekis atenton de la instruistoj. Baldaŭ radiostacio dissendis tiun muzikaĵon luditan de li sur piano. Tio estis la komenco de lia komponista vivo.

En la aŭtuno de 1960 Wang Liping eniris en la komponadan fakultaton de la Centra Konservatorio per altaj poentoj. Efektiviĝis lia espero. En la dua klaso li komponis serion da sonatetoj kun originala stilo, pro kio li ricevis laŭdojn de fakuloj. Post la diplomitiĝo li estis restigita en la konservatorio por komponado de la baletoj "Wang Gui kaj Li Xiangxiang".

Poste, ekde 1966 lia komponista vivo vegetis pro la dekjara tumulto.

Kiam li denove ekprenis la plumon, li unue pensis, ke artisto devas servi al la popolamasoj, al la junuloj, popularigi muzikon por riĉigi la spiritan vivon de la popolo.

Li kondukis freŝan fontakvon unue en la filman muzikon. En la komenco de 1978 li komponis la dokumentan filmon "Junulinoj Laborantaj Submare". La komponaĵo en freŝa kaj senluka stilo tuj gajnis la aŭskultantojn. Post nelonge li verkis la muzikaĵojn "Sur la Insulo Sun'" kaj "Gaja Kanto el Ondoj" por la televida filmo "Harbin en Somero". Ili, vaste kantataj, troviĝas inter la 15 belaj kantoj elektitaj de la popolamasoj.

Li komponis ankaŭ por la rakontaj filmoj "Pasaĝero Mankatenita", "Shaolin-templo", "Nevidebla Reto", "Tria Murdinto", "Krias la Maro" kaj "Nova Advokato".

De la somero de 1980 Radio Pekino plurfoje dissendis la "Koncerton de Wang Liping", ankaŭ la Centra Televida Stacio de Ĉinio telesendis programeron pri li. Multaj junuloj skribis leterojn al li. Ili rigardis lin kiel sian fidindan amikon kaj verŝis al li sian koron.

En sia letero iu lingvisto diris, ke li vivas streĉe kaj malofte kortuŝiĝis. Tamen, post kiam lia tuta familio aŭskultis koncerton de Wang Liping, li tuj skribis al ĉi tiu por gratuli.

Wang Liping respondis al li: "Mi nur deziras per miaj muzikaĵoj helpi aliajn restarigi noblan spiriton. Mi ofte sentas, ke mi ne kapablas plenumi mian deziron kaj la tasko estas tre peza, tre malfacila . . ." Tio ne signifas, ke li volis montri sin modesta, sed vidigas la veran senton de senĉese esploranta artisto al komponado. Li ofte ludis pianon senripoze, eĉ en ferioj.

Kvankam tre okupita, li havas intereson ankaŭ pri aliaj aferoj. Post la Internacia Somera Kampado li fariĝis amatoro-fotografisto. Foje lia fotografiaĵo gajnis unuagradan premion kaj aperis en "Elektitaj Verkoj de la Ĉina Fotografia Arto". Li amas ankaŭ kaligrafion, literaturon kaj sigelilan gravuradon. La teksto de iuj kantoj estis verkita kaj komponita de li samtempe.

Lia edzino Song Zufen estas sopranulo, milda kaj virta. Ili havas amindan filineton. Ilia familio estas feliĉa.

Wang Liping iam diris al mi: "La koro de la aŭskultantoj estas mia riĉaĵo. La kanto el mia koro estas ankaŭ ilia kanto."



Wang Liping


Sur la Insulo Sun'

Vortoj de Xing Lai, Xiu Tian
kaj Wang Liping

Esperantigis Laŭlum

Muziko de Wang Liping

Lirike, serene




1. En be- la ta- go de so- mer' a- bun das
2. Fe- liĉ- so- pi- ro bru- las en ju- nu- la



lum', Per ĉar- moj lo- gas nin jen la In- su- lo Sun', Kaj
kor', Kna- bi- najn bro- vojn lu- das jen mi- e- la ĝoj', Kun




kun fiŝ- ho- ka stan- go kaj kun ĉi- o por ten-
tre sin- ce- ra a- mo kaj kun be- la i- de-



la la la la la la la la la la la a



dum', Jen ni ve- nas al' In- su- lo Sun', Jen ni
al', Jen ni ve- nas al' In- su- lo Sun', Jen ni



ve- nas al' In- su- lo Sun'. Vi-glas ju-
 ve- nas al' In- su- lo Sun'. Fe- li- ĉo

a

nu- loj kun gi- tar', kaj en naĝ ves- to ju- nu- li-
 fon- tas el la- bor', el ŝvi- to kres- kas fe- li- ĉo-

la la la la la la la la la *a*

nar', kaj ĉa- sis- toj pre tas por ĉas- ba- ta- lo, pre- tas por ĉas- ba-
 flor'. A- mi- kar', per ni- a sâg' kaj for- to por pli be la mor-

a

tal'. *1.* *2.* *rit.*
 gaŭ', por pli be- la mor- gaŭ'.

a

La monto Sanqing

de YANG JINLIN

SE oni trajne traveturas la gubernion Yushan de Jiangxi-provinco en serena tago, ili povas vidi tra vagona fenestro du ĉielskrapantajn montojn en nordo. La okcidenta monto estas nomata Huaiyu kaj la orienta Sanqing. La lasta altas je 1 816 metroj super la marnivelo kaj aspektas aparte impona en nuboj.

La historiaj notoj de la gubernio diras, ke en la kvara jarcento alĥemiisto Ge Hong faris senmortigajn pilolojn en la montaro. Ĉar li estis taoisto, tial la monto fariĝis sanktejo de taoismo. Nun sur la monto estas ankoraŭ konservita la templo Sanqing. Sanqing en la ĉina lingvo signifas tri diojn de taoismo, kies statuoj nun staras en la templo.

La taoisma monto Sanqing forte altiras al si turistojn per groteskaj rokoj, kuriozaj pinoj, ĉarmaj nubomaroj, belaj akvofaloj, raraj arboj kaj sovaĝaj bestoj.

La diversformaj fajrodevenaj rokoj de la monto formiĝis de terkrusta movado kaj longa erozio. La monto havas sian plej altan pinton nomatan Yujing, al kiu kondukas zigzaga pado kun ŝtonaj ŝtupetoj longa je 20 kilometroj. La pado serpentumas supren laŭ krutaj rokmuroj en unu flanko kaj havas profundajn ravinojn en la alia flanko. Tial en surgrimpado la turistoj devas esti ĉiam atentemaj por ĉiu paŝo. Survoje ilin ravas belaj naturaj pejzaĝoj, tial ili ne povas ne halti

de tempo al tempo, por ĝui ilin, kio multe mildigas ilian lacon. La kulmino de la monto vastas pli ol mil kvadratajn metrojn, apud ĝi staras la giganta "Ŝtono al la Ĉielo". Legendo diras, ke homo deziranta iri al la paradizo povas leviĝi, post religia memkulturado, de la ŝtono al la ĉielo. Sed neniu ĝis nun leviĝis al la ĉielo. Tamen tie oni povas rigardi la ĉirkaŭajn montojn. La aliaj montoj altas ĉ. 1 400 metrojn super la marnivelo. En la antikveco turistoj donis figurajn nomojn al la groteskaj rokoj, ekz. Incensuja Monto, Ĉielŝtupara Roko, Ĉapa Roko, Arĝentbotela Roko, Roko de Novedzo Dorsportanta la Novedzinon. Tiuj nomoj ofte vekas ĉe turistoj abundajn imagojn.

La nubomaroj de la monto Sanqing estas tre ĉarmaj. Kiam nokta pluvo ĉesis kaj la suno ĵus leviĝis, la nuboj en la valoj ondadas kvazaŭ furioza maro kaj la montpintoj elstariĝis super la nuboj kvazaŭ izolitaj insuletoj. Kiam la suno brilis super la orienta horizonto, la blankaj nuboj fariĝis koloraj, tiuj pli proksimaj al la suno ruĝiĝis, tiuj malpli proksimaj helflaviĝis kaj tiuj en la malaltaj lokoj estis kvazaŭ diafana Laktovojo. Kun leviĝo de la suno, la nubomaroj variis brile. Vere estis eksterordinare bela pejzaĝo.

Ankaŭ ĝiaj akvofaloj estas tre belaj. Iu akvofalo altas je ĉ. cent metroj, kvazaŭ blanka rubando pendanta. Alia sin ĵetas

el valo kvazaŭ dancanta giganta boao. La plej granda akvofalo muĝas tiel forte, ke oni povas aŭdi ĝin en malproksimo kaj ĝiaj ŝprucantaj akveroj eĉ povas malsekigi harojn de turistoj apude starantaj.

Sur la monto kreskas piceoj, pinoj, santaloj, katalpoj (*Catalpa ovata*) kaj aliaj arboj. Podokarpoj (*Podocarpus macrophylla*) havas belan figuron. Ekzemple, ĉe monttalo staras du altaj podokarpoj kvazaŭ bonvenigantaj gastojn. Antaŭ kaj post la templo Sanqing troviĝas podokarpoj kun ombrel-forma frondaro, kvazaŭ ordigitaj per tondilo. Enirinta la arbaron oni sentas sin aparte agrabla.

Sur la monto tutjare kreskas diversaj floroj, herboj, kaj vivas multaj raraj birdoj kaj bestoj. En la fino de printempo floras purpuraj, blankaj kaj rozkoloraj rododendroj ĉe la montpiedo, kaj en la meza somero anstataŭe floras alispecaj rododendroj sur la monto. Tiam la monto kvazaŭ estas aera ĝardeno. Tie estas raraj muzikaj birdoj, kiuj bele kantas, simiursoj, kiuj havas simian vizaĝon kaj ursan korpon, kaj salamandro kun nigra dorso, ruĝa ventro, plata kapo kaj kvar kvin-ungaj piedoj.

En zoologia ĝardeno la salamandro ĉiam allogas al si multajn turistojn. Pro multaj bestoj kaj vegetaĵoj, la monto servas kiel bona scienc-esplora loko por zoologoj kaj botanikistoj.



Akvofalo de la Draka Lageto

La monto Sanqing

(Pri la detaloj legu la samtitolan artikolon en tiu ĉi numero.)

Fotoj de QIU YANGHAI



Nubaro en la montaro



Yujing, la ĉefa
de la monto Sa

La pinoj "Fratinoj"



Antikva pagodo sur krutajo




to
ng

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Foto de MALTE MARKHEDEN (Svedio)

Unu el la 100 000
svedaj lagoj



**Kokidaj
tranĉaĵoj en
celofano**



Ĉinaj pladoj



Gemaljunuloj en gimnastika ekzercado

(Daŭrigo de p. 19)

kancero. Ŝi tuj terurigis, vidinte, ke la foto pri ŝiaj pulmoj surhavas dekelkajn rondajn ombrojn. Tiam ŝin atakis ankaŭ kormalsano kaj artrito. En tia situacio ŝi ekvolis ekzerci sian korpon. Komence ŝi nur promenis kaj malrapide kuris. Poste, informiĝinte pri instrua stacio de tajĝiĉjuan, ŝi anoncis sin por lerni. Post certa tempo de ekzercado ŝi ekhavis bonan apetiton. Unu jaron poste ŝi povis bone dormi, ŝiaj haroj denove elkreskis kaj ombroj sur ŝiaj pulmoj ne plu multiĝis. De tiam ŝi ĉiutage persistas en sportado kaj fariĝis instruistino de la stacio.

Tajĝiĉjuan estas unu el la ĉinaj luktartoj kaj unu el la ĉinaj kuracaj sportoj. Ĝiaj movoj ŝajnas nelacigaj. "Fakte tajĝiĉjuan postulas grandan forton. La ekzercado varmigas mian tutan korpon kaj eĉ sentigas al mi sangocirkuladon en miaj brakoj," ŝi diris. Nun, krom fari la gimnastikon tajĝiĉjuan ŝi ankaŭ malrapide kuras 2 000 metrojn ĉiutage. Ŝi ofte monto-grimpas ekster la urbo. Dank'

Kokidaj tranĉaĵoj en celofano

Materialoj:

| | | |
|-------------------------|---------------|------------|
| | Sezamoleo | 10 g. |
| Brusta viando de kokido | Rizvino | 10 g. |
| Haketita ŝinko | Pipra pulvoro | 0.5 g. |
| Ovoblanko | | de unu ovo |
| Salo | | 5 g. |
| Gastronomia pulvoro | | 5 g. |

Preparado:

1. Tranĉu la brustan viandon en

maldikajn pecojn kaj miksu ilin kun ŝinkohaketaĵoj kaj spicaĵoj. Preparu 20 folietojn de celofano de 4 kvadrataj coloj. Paku la tranĉaĵon en folietojn de celofano.

2. Fritu la pakitajn tranĉaĵojn en pato ĉ. unu minuton. Elprenu kaj metu ilin sur teleron, kaj tiam la plado estas preta.

al sia 8-jara sportado, ŝi fariĝis pli kaj pli fortika. "Mi ne havas ian panaceon. Mia sperto estas sin teni serene, preni taŭgajn nutraĵojn kaj medikamentojn, kaj, pli grave, ekzerci la korpon," ŝi konkludis.

En Ĉinio troviĝas diversaj luktartoj, kaj multajn el ili oni ŝatas dum sia tuta vivo. La emerita laboristo Yuan Jingquan lertas en luktarto paŭĉujĉuan, kiun inventis bonzo de la templo Shaolin en Henan-provinco — la sanktejo de la ĉinaj luktartoj. Paŭĉujĉuan, karakterizita per fortaj kaj mildaj movoj, povas fortigi la sanon, tial ĝi estas tre populara.

Kiam Yuan Jingquan estis juna, li laboris kiel kontisto de iu butikoj de skribiloj. Pro longa laborado li malsaniĝis je ftizo kaj tre malfortiĝis. Poste li petis iun instrui al li la luktarton, tial li resaniĝis iom post iom. Dum dekoj da jaroj li ekzercadis sian korpon. Se li ĉesus tion fari eĉ unu tagon, li eksentus sin malbone. Nun tiu pli-ol-80-jara maljunulo, plena de vikleco, bone aŭdas kaj vidas.

Kiel praavo, Yuan Jingquan ĝuas feliĉan vivon. Li ĉiam sin tenas kviete, bonhumore kaj grandanime. Li ŝatas kaligrafion kaj literaturajn verkojn. Nun li funkcias kiel prezidanto de la Pekina Paŭĉujĉuan-asocio. Ĉiumatene dekoj da junuloj kaj mezaĝuloj lernas de li paŭĉujĉuan. Nun li havas centojn da lernantoj.

Krome, ankaŭ malrapida kuro estas ŝatata de maljunuloj. La Pekina Korpokultura kaj Sporta Komisiono okazigas maratonan konkurson unu fojon ĉiujare. En maratona konkurso okazigita antaŭ nelonge, iu maljunulo

starigis la rekordon per 3 horoj kaj 14 minutoj.

Depost 1978 la Sporta Instituto sub la Korpokultura kaj Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko, la Pekina Korpokultura kaj Sporta Komisiono kaj la Redakcio de "Sporta Gazeto" kune aranĝas sportkunvenon por maljunuloj unu fojon ĉiujare. En la sportkunveno estas longdistanca kuro, luktarto, ĉigong*, tablotenisoktp. Krome, unufoje ĉiujrintempe okazas longdistanca kuro kaj unufoje ĉiuaŭtune maratono. Ankaŭ la korpokulturaj kaj sportaj komisionoj de la distriktoj kaj gubernioj de Pekino ofte okazigas respektive sian sportan konkurson.

Nun la Pekina Korpokultura kaj Sporta Komisiono faras preparan laboron por fondi la Pekinan Maljunulan Korpokulturajn kaj Sportajn Asociojn por akceli la disvolviĝon de maljunula sportado.

* Ĉigong estas unu el la ĉinaj gimnastikoj por fortigi la sanon.



SUN JINGSHENG:

Nemalaperinta neĝfloko

(novelo)



DENOVE neĝas ekster la fenestro.

La blankaj neĝflokoj, kiel leontodaj semoj kun lanugoj, flirtas en vento, kaj ankaŭ kiel anseraj plumoj, falas senbrue. Ili estas flugetantaj en la aero senhalte, senfine. . .

Rigardante tiujn flirtantajn neĝerojn, mi ekpensis pri iu knabo, knabo malaperinta kiel malgranda neĝero. . .

I

Mi estis svene portita en malsanulan ĉambron. Mi ne sciis, kiom da tagoj mi dormis. Mi rekonsciiĝis, malfermis la okulojn kaj vidis knabon antaŭ mi. Kun grandaj brilaj okuloj, malfermita buŝo kaj elmontritaj kojnodentoj, li ĝoje ekkriis: "Li

vekiĝis, li vekigis.” Lia mieno estis tre interesa.

Lia krio venigis kuraciston, flegistinojn kaj mian edzinon kun velkinta vizaĝo. Ĉiuj sin turnis al mi kun ĝoja mieno. Fine oni savis min el la manoj de la Morto.

Mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron kun areo de nur dek kvadrataj metroj, kie staris tri litoj. Proksime al mi duonkuŝis sur lito mezaĝulo, kiu iom sin levis por saluti min. Staris alia lito kun malorda litkovrilo. Neniu estis sur ĝi. Ĉu ĝi estas por tiu knabo en malsanuleja noktoĉemizo?

Mia edzino gajmiene eliris kun pelvo por preni akvon.

Eble pro scivolemo pri mi, la knabo diris per dolĉa voĉo: “Onklo, vi dormis du tagojn,” li starigis siajn mezan kaj montran fingrojn por akcenti, “du tagojn. . . Kian malsanon vi suferas?”

“Divenu,” mi ridetis.

“Ĉu ankaŭ vi anemiigis kiel mi? Ne gravas. Ankaŭ mi iam dormis kelkajn tagojn. Doktoro diris, ke necesas multe manĝi nutrajn manĝaĵojn. Baldaŭ mi resaniĝos.”

Mi kapjesis, turnis la kapon al la mezaĝulo kaj demandis lin, je kio li estas malsana. Li diris, ke terure reduktiĝis liaj sangaj globetoj kaj oni ankoraŭ ne povis eldiri kialon. Nur tiam mi eksciis, ke la ĉambro estas por suferantoj de sangaj malsanoj.

Mia edzino revenis. Ŝi lavis al mi la vizaĝon, dirante, ke necesas aĉeti manĝkuponojn, sed ŝi forgesis monon en la hejmo. Tion rimarkinte, la sagaca knabo ekkriis per sonora voĉo: “Onklino, mi havas.” Li mistere ekridis, kuris al sia lito,

elprenis dek juanojn el papera monujo el sub la kapkuseno, kaj tuj enmanigis la monon al mia edzino.

“Sed mi povos redoni al vi nur post du tagoj. Tiam vi? Ne, ne,” ŝi hezitis kaj volis redoni la monon al li.

La knabo malĝojiĝis. Li ekpaŭtis: “En tiu ĉi ĉambro ni ja estas samfamilianoj.”

Mi ekridis, ekridis ankaŭ mia edzino.

II

Mi eniris en tiun malgrandan tri-personan mondon kaj bone konis ĝin post nelonge. La mezaĝulo nomiĝis Lao Gu kaj la knabo, Xue Jingjing. Lao Gu estis neparolema. Li ĉiam mienis ridete, kaj oni ne komprenis, ĉu tio signifas aprobon aŭ malaprobon. Dum Jingjing estis moviĝema. Ĉiutage nur antaŭtagmeze, kiam kuracistoj venis ekzameni la malsanulojn, li obeeme kuŝis sur la lito dudek minutojn, sed forestis en alia tempo. Mi rimarkis, ke li amas rigardi sur la balkono kun la brakoj apogitaj sur la balustrado. Ne malproksime de la balkono estis muro, ekster kiu etendiĝis larĝa strato tuttage movoplena; pli fore staris monto kaj el verda arbaro elrigardis neklera ronda tegmento de sporthalo. . . Ho, li rigardis la pejzaĝon. Mi tre miris, ke Jingjing estis “granda” persono fame konata en la tuta oka kuraca sekcio. Oni ŝerce nomis lin Granda Jingjing. Li ricevis tiun karesnomon pro sia konduto. Vidu, tuj antaŭ la komenco de la manĝado li mallaŭte kriis, ke homoj ĉirkaŭ la manĝaj-ĉareto cedu al li lokon por ke li povu porti la manĝaĵojn al ne-iripovaj malsanuloj. Aŭdinte lian infa-

nan voĉon, oni tuj cedis al li vojon. Li plej volontis transdoni menuon. Ĉiuvespere, ricevinte menuon, li senprokraste iris kun ĝi al aliaj ĉambroj. Kiel printempa vento, li alportis vivecon al tiuj ĉambroj. Iu ŝerce diris al li: “He, Granda Jingjing, mendu por mi pladon laŭ via opinio.” Kiam li revenis al la ĉambro, jam estis tempo por enlitiĝo. Eĉ la ĉefflegistino povis fari nenion kun li.

Mi informiĝis en nia babilo: Lia familio loĝis en gubernia urbeto malproksime de nia urbo. Lia patro mortis kaj lia patrino instruis en elementa lernejo. Ŝi vizitis lin unu fojon ĉiumonate. Li havis fraton je tri jaroj pli aĝan ol li.

Iam li ankaŭ petolis. Li kaŝis medikamenton en boteleto kelkajn tagojn, ne volante preni ĝin. Tion mi malkaŝis al la ĉefflegistino. Ŝi kritikis lin. Pro tio li eĉ ne parolis kun mi dum pluraj tagoj. Iun tagon li subite sin turnis al mi por prunti monon. Mi ŝerce diris: “Tamen ne aĉetu frandaĵojn!”

“Lasu, se vi ne volas. . .” li tuj forkuris.

Poste mi sciigis, ke li intencis transprunti la monon al malsanulo en najbara ĉambro. Li rebonigis sian sintenon al mi nur kiam mi pruntedonis la monon al tiu malsanulo.

Nin tedis sola kuŝado, tial ni samĉambranoj ofte babilis. Foje ni interparolis pri vivo kaj morto. Kun larĝe malfermitaj okuloj Jingjing aŭskultis apude kaj ekdiris: “Mi ja ne volas morti!”

“Vi timas morton, ĉu ne?”

“Ne . . . Mi ne volas forlasi vin ĉiujn, la avon sur la lito

n-ro 38, la onklon Grandorelulo sur la lito n-ro 24, ankaŭ la ĉefflegistinon, doktoron Chen. . . nek volas forlasi miajn panjon kaj fraĉjon. Kiel malĝojaj ili estus, se mi mortus! Onklo Sun, mia panjo diris, ke iuj povas reviviĝi post sia morto dum aliaj vivas kvazaŭ mortinto. . . Ŝi diris, ke mia avino ankoraŭ vivas. . .”

“Via patrino ja sopiras vian avinon,” intermetis Lao Gu.

“He ankaŭ mi sopiras ŝin, kial do mi ne vidas, ke ŝi vivas.”

Mi kun rideto rigardis Lao Gu kaj vidis lian malserenan vizaĝon. Li respondis al mi per devigita rideto. Ŝajnis al mi, ke lia rido kaŝas ion ĉagrenan.

III

Fariĝis malvarme. Baldaŭ ekneĝegis. La neĝflokaj flirtis kiel arĝentaj papilioj.

Pro frosto kaj neĝo provizado de la kuracaj sekcioj per varma akvo fariĝis malfacila. La ĉefflegistino petis, ke la iripovaj malsanuloj mem prenu por si akvon en la akvoprovizejo. Tio ege ĝojigis Jingjing. Li flustris ĉe mia orelo, ke nun la pordistino lasos lin eliri rigardi neĝadon.

Tiun posttagmezon Jingjing subite revenis al la ĉambro, kun malgaja mieno. Mi demandis lin, pro kio li ĉagreniĝis. Li ne donis respondon. Li kuŝiĝis sur la lito kaj kaŝis la kapon sub la litkovrilo. Lao Gu mansvingetis al mi, ke mi ne faru al li demandon.

Post momento mi kaj Lao Gu iris al necesejo. Li diris al mi, ke antaŭ du tagoj kiam Jingjing iris preni akvon, li falis teren kaj pro tio lia nazo sangadis

senĉese. La ĉefflegistino havis interparolon kun li. Ŝi diris, ke lia malsano nun fariĝis infekta, kaj malpermesis al li iri tien kaj reen, por ke li ne infektu aliajn.

Mi demandis Lao Gu, kian malsanon Jingjing suferas. Li peze ekspiris kaj malvolonte respondis: “Leŭkemion.”

Mi tremis per la tuta korpo, kvazaŭ fulmofrapite.

Mi revenis en la ĉambron kaj vidis Jingjing plorsingultanta. Li mallaŭte ploris. Mi ne sciis, pro kio li malĝojis — ĉu pro graviĝo de sia malsano aŭ pro la malpermeso de la ĉefflegistino, ke li ne plu ludu. Lia plorado korŝiris min. Mi pensis, ke mi devas helpi lin per io. Mi tuj ekmemoris, ke li tre ŝatas mian poŝtransistoron, sed ne kuraĝas prunti ĝin. Mi ĝin elprenis kaj portis al li, mallaŭte dirante: “Jingjing, jen transistoro. Baldaŭ komenciĝos programero pri rakonto!”

Li turnis al mi la vizaĝon kun ruĝaj larmoplenaj okuloj kaj nazo ŝtopita per vato. Li rigardis min, senforte skuis la kapon: “Mi . . . infektas. . .”

Post momento li subite demandis min: “Onklo Sun, ĉu mi infektis onklon Grandorelulo kaj aliajn, ĉar mi helpis ilin per portado de manĝaĵoj?” Ĉe tiuj vortoj grandaj larmogutoj denove elruliĝis el liaj okuloj.

Ehe, li ĉagreniĝis pro tio. Mi kaj Lao Gu tuj lin konsolis dirante, ke lia malsano komencis infekti nur en tiu tago, kiam la ĉefflegistino sciigis al li. Nia klarigo estis tiel efika, ke ĝi ŝajne tuj forpelis lian ĉagrenon. Li tuj sidiĝis: “Ĉu vere?”

Post la tagmanĝo Jingjing denove malaperis el la vido. Mi iris ĉerpi akvon kaj vidis, ke

Jingjing elpaŝis el iu ĉambro. “Jingjing, vi malobeema!” mi tuj kaptis lin.

“Mi devas sciigi al ĉiuj, ke mi infektas kaj ne povas transdoni al ili menuon,” diris Jingjing kun malserena vizaĝo.

Mi estis delikate kortuŝita de liaj vortoj. Kiel aminda estis la malgranda Jingjing! Subite venis al mi ideo, ke mi devas doni iom da helpo al tiu knabo, kies vivo estas malpli longa ol la mia. Mi decidis konigi al li metodon eviti infektagon. Kompreneble tio estas trompa, tamen povas forigi lian malĝojon. Jes, kiam mi diris al li la metodon, liaj okuloj malhelaj dum la tuta tago ekbrilis.

Tamen lia deziro ne realiĝis. Posttagmeze la kuracisto venis por tiri el li medolon. Jingjing ne konsentis, ĉar pro tio li devas senmove kuŝi sur la brusto ok horojn. Li petis la kuraciston, ke li tion faru morgaŭ antaŭtagmeze. Li preferis, ke la kuracisto tiru pli da medolo morgaŭ. La kuracisto kapneis. Nur mi

“Onklo, vi dormis du tagojn. . .”



kaj Lao Gu sciis la sekreton de la knabo.

Vespere, jam estis tempo por mendi pladojn por la sekva tago. Dum mi legis libron, Jingjing kompatinde kuŝis surbruste. Li subite diris al mi en petanta tono: "Onklo Sun, ĉu vi volontas porti menuon al aliaj ĉambroj anstataŭ mi. . .?"

Turnante paĝon de la libro, mi respondis, ke hodiaŭ vespere la menuo estos transdonita de unu ĉambro al alia kaj ne prokrastiĝos la afero.

"Se iu forestos?"

"Ĉu?"

"Jes, se iu estos en necesejo aŭ elhospitaliĝos portempe laŭ permeso aŭ. . ."

Tion mi ne sciis kiel respondi.

IV

Apenaŭ finiĝis liaj vortoj, profunda dormo kaptis lin. La sekvantan tagon li ne plu havis forton porti menuon. Li ekfebris kaj kuŝis dum sinsekvaj tri tagoj.

Tiun tagon denove flirtis neĝflokaj ekster la fenestro. Iu maljunulo venis por rigardi Jingjing, kaj ĉi tiu senforte ridetis: "Avo, ĉu vi. . . resaniĝis? Mi fartas tre malbone, ĉu mi mortos? . . ."

"He, neblas! Vidu, antaŭ du tagoj ankaŭ mi ne povis leviĝi el la lito, nun mi jam bone sentas min!" la maljunulo trankviligis lin.

"Ne. Estus bone, se mi mortus. Panjo diris, ke mortinto povas reviviĝi. Post morto la malsana Jingjing povas transformiĝi en sanan. . ." li diris kaj lace fermis la okulojn.

Ĉi-momente mi sentis amarecon neesprimeblan en la koro.

Pasis plia tago. Mi petis forpermeson hejmen. Vespere mi revenis al la hospitalo. Kiam mi eniris en nian kuracan sekcion, de malproksime mi vidis homojn svarmantaj ĉe la pordo de nia ĉambro, videble, tie staris ĉiuj malsanuloj, kiuj povis leviĝi el la lito. Mi sentis atmosferon neordinaran. Tremis mia koro, ĉu Jingjing. . .?

Mi min enŝovis en la homamason kaj kun miro demandis: "Kio okazis?" Estis silento, neniuj respondis. Eble oni timis. Ne, oni ne volis diri la malĝojigan vorton. Post kelkaj minutoj oni puŝis el la ĉambro rulliton, sur kiu kuŝis malgranda korpo kovrita per blanka littuko. Aĥ, Jingjing! Mi stuporiĝis. Kiel mi povus kredi tion vera?! Mi vidis, ke ruĝiĝis la okulrandoj de la ĉeflegistino, ruĝiĝis ankaŭ tiuj de Lao Gu, ruĝiĝis tiuj de tre multaj homoj. Oni korsiĝis akompanis la knabon per okuloj. Longe, longe oni ne volis forlasi nian ĉambron, kvazaŭ la knabo ankoraŭ revenus.

La sekvantan matenon mi frue leviĝis pro sendormeco. Mi staris antaŭ la fenestro. Ekstere neĝo jam ĉesis. La tero estis vestita per blindige blanka neĝo, sankte pura. Mi sentis neesprimeblan korporemon. Ŝajnis al mi, ke iu vokis min per bela voĉo: "Onklo Sun, kial iuj neĝflokaj estas grandaj kaj aliaj malgrandaj?"

"La neĝflokaj similas al homoj, la grandaj al plenkreskuloj kaj la malgrandaj al infanoj. Rigardu, la grandaj neĝflokaj falas rapide kaj la malgrandaj malrapide, ĉar la grandaj estas pezaj kaj la malgrandaj malpezaj. . ."



Apenaŭ finiĝis liaj vortoj, profunda dormo kaptis lin.

Sed Jingjing foriris pli frue ol mi. Ŝajnis al mi, ke mi ŝuldas ion al li. Kion? Mi mem ne povis klare diri.

Mi elpasis el la ĉambro kaj trovis, ke la tuta kuraca sekcio fariĝis melankolia. Venis ĉareto kun matenmanĝo. Ne plu estis rido. Oni multe mallaŭtigis sian voĉon. En la kuraca sekcio regis serioza atmosfero, kian mi neniam spertis dum kelkaj monatoj post mia enhospitaliĝo. Tia fenomeno kortuŝis min, longe emociis min. Tempo pasis. Iun tagon mia kapo subite fariĝis klara kaj mi ekkomprenis, ke mi ŝuldas ne al Jingjing, sed al tiu ĉi mondo. Kion belan mi devas lasi dum mia ne tre longa vivo? Pro tio mi prenis plumon por skribi pri la malgranda Jingjing.

Estimataj legantoj, pardonu min pro mia mallerta verko.

RENKONTE AL LA NOVA JARO

ABONVARBA KAMPANJO

por

EL POPOLA ĈINIO

Ekde 1-a nov. 1982 ĝis 28-a feb. 1983

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum la supra periodo de la kampanjo, ĝuos 20% da rabato kaj donace ricevos Esp. koloran kalendaron por 1983.

ABONTARIFO

| | | | |
|--------------------|-----------------|----------|------------------|
| 1 jaro (12 n-roj) | £3.00 US\$6.00 | post | =£2.40 US\$4.80 |
| 2 jaroj (24 n-roj) | £5.00 US\$10.00 | rabatado | =£4.00 US\$8.00 |
| 3 jaroj (36 n-roj) | £7.00 US\$14.00 | | =£5.60 US\$11.20 |

Atentigo: La supra tarifo ne validas en landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. Abonantoj kaj reabonantoj tie bonvolu atenti EPC-anoncon en sialandaj Esp.-periodaĵoj aŭ sin turni al la loka peranto.


Memoraĵoj por abonvarbantoj

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPC. La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto kun peto, ke la lasta enskribu lin aŭ ŝin kiel abonvarbanton. Aŭ oni sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al ties akirita sukceso.

Tamen, ne forgesu aboni aŭ reaboni por vi mem!

**PROSPEKTON KAJ
PROV-EKZEMPLERON ONI
SENDOS SENPAGE LAŬ PETO**

Esperanta Sekcio de
CENTRO DE
ĈINAJ ELDONAĴOJ
(GUOJI SHUDIAN)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Dum postlaboraj horoj

Fotoj de ZHANG WEI


En la apudmara urbo Kantono en suda Ĉinio estas multaj junaj laboristoj, kiuj konsistigas pli ol duonon de la totala nombro de la urba laboristaro. Ili amas sian ĝojplenan vivon. Post la laborado ili partoprenas en diversaj aktivadoj, kiel pentrado, fotado, sportado, ludo de muzikiloj kaj prezentado de dramoj. La urba laborista sindikato konstruigis por ili kulturdomon, por ke ili bone pasigu siajn postlaborajn horojn.

Amantoj de akordiono



Sur herbejo






En kvieta loko de parko




Amantoj de fotado

Al sportejo





Amatoroj-pentristoj




Ŝi ŝatas legi en kvieta loko.



Antaŭ prezentado

Juna geedza paro





Babilo en tetrinkejo



En biblioteko de laborista kulturdomo

Tradiciaj festoj de Ĉinio (I)

de MEI ZHI

ĈINIO estas lando kun multaj naciecoj. Ĉiu el ili havas siajn enhavoriĉajn festojn. Ĉi sube ni konigas al vi, niaj legantoj kelkajn tradiciajn festojn de Han-nacieco.

La Printempa Festo

Kiam venas printempo kaj revigliĝas ĉiuj vivestajoj, la ĉina popolo celebras unue la Printempan Feston, la Novjaron de la ĉina luna kalendaro. De antikve, ĝi jam estas aparte grava festo. Nun, laŭ la difino de la ŝtato oni havas tri liberajn tagojn por ĝui la feston tra la tuta lando.

En la antikveco oni solenis la Printempan Feston ĉefe per forpelo de diabloj kaj demonoj kaj kulto al dioj: Por forpeli diablojn kaj demonojn kaj preĝpeti pacon oni eksplodigis petardojn, skribis nomojn de dioj sur persikarbligna tabulo kaj pendigis ĝin sur la pordoframo. Nun la antikvaj moroj ekhavis novajn signifojn: Petardado simbolas ĝojan celebradon de la festo kaj la versparo skribita sur ruĝaj paperoslipoj kaj algluita sur la pordoframoj plenas de sopirado al bela vivo.

Antaŭvespere de la Printempa Festo la tuta familio kune sidas ĉe la tablo kaj ĝuas abundan manĝaĵon novjaran. Dum la nokto oni ne dormas por adiaŭi la forpasantan jaron kaj bonvenigi la novan. Matene de la sekva tago, oni vizitas siajn parencojn kaj amikojn kun nov-

jaraj bondeziroj, kio estas nomata novjara saluto.

Ankaŭ multaj nacimalplimultoj de Ĉinio kutimas celebri la Printempan Feston. Sed ili pasigas ĝin kun malsamaj manieroj. Ekz., frumatene de la Printempa Festo la dahuroj kun manoj plenaj de fulgo konkure ŝmiras alies vizaĝojn, kio signas bondezirojn al riĉa rikolto. La buji-aj knabinoj konkure vektoportas akvon la unuaj en tiu tago, kio simbolas laboremon. Kaj la olunĉun-aj junuloj konkuras pri sagpafo surĉevale kaj la knabinoj elektas sian amaton el la venkintoj.

La Lanterna Festo

La 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la Festo de Gluecrizaj Pasteĉoj, alinome la Lanterna Festo.

Antaŭ pli ol 2300 jaroj en Chu-regno oni lumigis lampojn en la nokto de la 15-a de la unua monato por kulti la dion de la Suno. En la 5-a kaj 6-a jarcentoj, t.e. en la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj, furoris budhismo kaj taoismo. Tial la Lanterna Festo funkciis kiel religia festo. En la 7-a jarcento, t.e. en Tang-dinastio, la festo fariĝis des pli solena. Tiutage la imperiestro ordonis nuligi la noktan elirmalpermeson por ke ĉiuj libere iru tien kaj reen surstrate kaj rigardu sate iluminajn lanternojn. Kaj en la 10-a jarcento, t.e. en Song-dinastio, krom lumigi lanternojn, oni

ankaŭ prezentis surstrate operon kaj dancon riĉajn je popola gusto.

En la moderna tempo la Lanterna Festo servas kiel bona ŝanco por montrado de popolaj metiartaĵoj. Ĉiufoje en la nokto de la festo, en iuj urboj oni eksponas diversformajn, ĉarmajn lanternojn, kiel palacaj lanternoj, murlanternoj, karuselaj lanternoj, animalfiguraj lanternoj k. a. Krome, en iuj lokoj oni ludas ankoraŭ balancilojn kaj draklanternojn, raketas, danacas sur stilzoj kaj prezentas jango-dancon.

En tiu tago krom rigardo de lanternoj oni kutime manĝas en bolanta akvo kuiritajn pasteĉojn faritajn el gluecriza faruno kun sukero, dispecigitaj osmantfloroj kaj nuksoj ene. La pasteĉo maldiktegaja kaj bongusta estas rigardata de antikve kiel altklasa manĝaĵo.

La Tago de Klara kaj Brilo

La 5-a (aŭ la 4-a) de aprilo estas la Tago de Klara kaj Brilo.

Ĝi estas ŝatata de la ĉina popolo. Ĉar tiam la tago estas serena kaj vegetaĵoj burĝonas, ĉio reviviĝas sur la tero. Tiutage oni ĝojplene ekskursas al antaŭurbo. Tie ili deŝiras kelkajn salik-frondojn kaj pendigas ilin sub la tegmentrandon de sia domo. Virinoj de iuj lokoj plektas delikatan girlandeton el saliko-frondoj kaj metas ĝin sur la kapon kiel simbolon de eterna juneco.

Ĉinoj havas moron en tiu tago viziti la tombojn de mortintoj por ilin memori aŭ planti salikojn. Tio eble devenas de la Festo de Malvarma Manĝaĵo. Legendo diras, ke antaŭ pli ol 2600 jaroj, t.e. en la periodo Printempo kaj Aŭtuno, post

Miniaturado de la ekonomia disvolviĝo de ĉinaj nacimalplimulto

EN septembro kaj oktobro de 1982 okazis en la Nacia Kultura Palaco de Pekino la Foiro de Uzaĵoj, Malpezindustriaj Produktaĵoj kaj Drogherboj de Ĉinaj Nacimalplimulto, kiu aliris al si multajn klientojn kaj rigardantojn de Pekino kaj aliaj lokoj de Ĉinio.


La foiro estis aranĝita kune de la Ĉina Komisiono pri Nacimalplimultaj Aferoj, Ministerio de Malpeza Industrio, Tekstila Ministerio kaj Ŝtata Medicina Administrejo, kun la celo kontroli la progreson de la ekonomio de nacimalplimulto kaj akceli disvolviĝon de ilia komerco. Estis la unua fojo por Ĉinio okazigi tian foiron en la pasintaj tridek tri jaroj post ĝia fondiĝo. En la foiro estis montrataj kaj vendataj produktaĵoj de pli ol 4 000 specoj el 25 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Dum pli ol 50 tagoj la foiro ĉiutage akceptis 15 000 klientojn kaj rigardantojn.

En la haloj de la palaco estis

eksponataj kaj vendataj nacistilaj lanaj tekstilaĵoj, ledajoj, metiartaĵoj kaj diversaj sekigitaj kaj freŝaj fruktoj, lokaj produktaĵoj kaj altvaloraj drogoj, inter kiuj troviĝis lana litkovrilo de Ningxia honorita per arĝenta medalo de la ŝtato, lana gabardino, retmelono kaj sekigita vinbero de Xinjiang, pluŝo de

Qinghai, naturkolora tapiŝo de la Interna Mongolio, laktopulvoro de Heilongjiang, murtapiŝo de Tibeto, vakse tinkturita ŝtofo de Guizhou, brokaĵo de Guangxi, ruĝa teo de Yunnan, ginsengo kaj juna cervokorno de Jilin, licio de Ningxia, gastrodio (*Gastrodia elata*) de Hubei, pseŭdo-ginsengo de Yunnan kaj angeliko de Sichuan. Kaj krome, estis ankaŭ diversspecaj vivbezonaĵoj produktitaj de Ŝanhajo, Shandong kaj aliaj lokoj por nacimalplimulto.

La foiro estis okazigita dank' al granda helpo de diversaj fakoj de la ŝtato pri komerco, ma-



Angulo de la foiro

kiam surtroniĝis la regnestro Zhong Er, li multe premiis kaj promociis siajn antaŭajn sekvantojn, sed lia savinto Jie Zhitui ne akceptis tion kaj ekvivis sian ermitan vivon sur la monto Mianshan (en la nuna Jiexiu-gubernio, Shanxi-provinco). La regnestro Zhong Er povis fari nenion alian ol bru-

ligi la monton por ke li eliru. Sed li rifuzis tion kaj brulmortis kune kun sia patrino. Por memori lin la antikvuloj de Ĉinio en la tago de lia morto prenis malvarmajn manĝaĵojn, por eviti uzon de fajro. La moro herediĝis kaj fariĝis la Festo de Malvarma Manĝaĵo. Unu aŭ du tagojn post la festo estas la

Festo de Klara kaj Brilo, kiu de tiam strikte ekligiĝas kun balaado de tomboj por rememori mortintojn.

Nun en la Festo de Klara kaj Brilo oni balaas la tombojn de la revoluciaj martiroj, metas florkronojn antaŭ ili aŭ plantas en la tombejoj junajn salikfrondojn por ilin karmemori.

terialoj, financo, imposto kaj transportado kaj la pekina registaro. Al la foiro donis grandan atenton ankaŭ gvidantoj de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kiuj partoprenis en la foiro. Ili prenis la foiron kiel ŝancon por montri la sukcesojn de la ekonomia konstruado en nacimalplimultaj regionoj. La eksponataj kaj vendataj komercaĵoj karakteriziĝis ne nur per okulfrapa nacieco kaj bona kvalito, sed ankaŭ per kompleto de specoj, kaj pro tio la foiro ĝuis laŭdojn de la publiko.

Kiel ĉiuj scias, krom hannacieco Ĉinio havas 55 nacimalplimultojn, kies membroj konsistigas 6.7% de la totala loĝantaro de Ĉinio. Pro malsameco en naturaj kondiĉoj, ekonomia vivo, psikologio kaj religia kredo ĉiu nacimalplimulto formas siajn proprajn historiajn kaj kulturajn tradiciojn, stilojn kaj kutimojn dum la longa pasinteco, kaj havas apartan bezonon pri ĉiutagaj bezonaĵoj. Respekti iliajn naciajn tradiciojn, morojn kaj kutimojn kaj helpi ilin disvolvi la naciajn ekonomion kaj komercon estas grava konsistiga parto de la ĉina politiko pri egaleco de ĉiuj naciecoj.

En la pasinteco, pro la nacia

diskriminacio kaj subpremado fare de la regantoj de ĉiuj feŭdaj dinastioj, tre malrapide progresis la socio de ĉiuj nacimalplimultoj, postrestis ilia nacia ekonomio kaj tre mizera estis la provizado de iliaj vivbezonaĵoj. Post kiam fondiĝis la nova Ĉinio en 1949, la popola registaro ne nur garantiis al la nacimalplimultoj politikan egalecon, sed ankaŭ aktive disvolvis ilian ekonomion kaj atingis grandan sukceson en tiu flanko. Precipe post kiam Ĉinio elmetis al si la grandan taskon efektivigi modernigon de industrio, agrikulturo, nacia defendo kaj sciencoj kaj teknikoj, la popola registaro donis pli grandan helpon al la nacimalplimultoj por disvolvi ilian ekonomion. De 1977 ĝi fondis, en la investo por la fundamenta konstruado, specialan subvencion por helpi la konstruadon de la landlimaj kaj nacimalplimultaj regionoj. De 1979 ĝi organizas Ŝanhajon, Jiangsu kaj aliajn lokojn ĉe marbordo, kiuj havas solidan bazon ekonomian, helpi en ekonomia administrado kaj teknikoj Tibeon, Yunnan kaj aliajn lokojn koncentre loĝatajn de nacimalplimultoj. De 1979 ĝis 1981 la totala sumo de la investaĵoj por la fundamenta kons-

truado en nacimalplimultaj regionoj atingis 14.88 miliardojn da juanoj, t.e. 28% de la totala sumo de investaĵoj en la pasintaj 29 jaroj post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Laŭ statistiko, la totala produktovalor de industrio en nacimalplimultaj regionoj en 1980 kreskis je 20-oblo kompare kun tiu en 1952, meznombre je 11.3% ĉiujare kaj tiu de agrikulturo kreskis je 2.5-oblo.

En la lastaj jaroj la ŝtato donis apartan atenton al la produktado de vivbezonaĵoj propraj al nacimalplimultoj. En majo de 1981 okazis la Tutlanda Laborkunveno pri Komerco kaj Produktado de Vivbezonaĵoj de Nacimalplimultoj, kiu reformis koncernajn politikojn por ke ili estu favoraj al la produktado de nacimalplimultaj bezonaĵoj. Dank' al tio multe progresis ĉirilata produktado. Nun nia lando jam fondis 11 bazojn kun pli ol 1 700 tiaj entreprenoj por produkti nacimalplimultajn bezonaĵojn, iliaj produktaĵoj atingis mil specojn. La foiro certe utilas al ekonomiaj kunlaboroj kaj teknikaj interŝanĝoj inter diversaj nacimalplimultoj kaj akcelos plian disvolviĝon de ilia ekonomio.





Renkontiĝo de malnovaj amikoj en la foiro

La antikva landlima urbo Kashi

de LAO BAI

EN la nordokcidenta parto de nia lando troviĝas la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kiu okupas ĉ. sesonon de la totala areo de Ĉinio. En la pasinta aŭgusto mi flugis de Pekino, tra la ĉefurbo Urumqi de la regiono, al la urbo Kashi por ĝin viziti. La urbo situas en la suda parto de la regiono kaj estas dense loĝata de uĝuroj. “Kashi” signifas ceramikaĵon en la antikva turka lingvo. En la antikveco ĝi estis pasejo sur la Silka Vojo, kiu kondukis al okcidenta Azio. Laŭdire, ĝiaj urbomuroj estis masonitaj per verde glazuritaj kaj gravuritaj brikoj, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon.

Kiam mi veturis en la urbon per aŭto, mi ne trovis tian urbomuron, tamen min allogis forte la elegantaj konstruaĵoj kaj neordinaraj moroj de la uĝuroj.

ANTIKAJ ELEGANTAJ KONSTRUAĴOJ

Iun fruan matenon mi promenis sur mallarĝa strato de la malnova urbo Kashi. Ambaŭflanke de la strato staras vicoj da ĉielskrapantaj poploj, inter kiuj troviĝas elegantaj domoj. Ekirante de la malnova urbo suden, laŭ larĝa asfaltita ŝoseo, mi venis al la nova urbo konstruita sur la antaŭa marĉo en la kvindekaj jaroj. Nun tie staras dekoj da domoj ornamitaj per tradiciaj desegnoj de uĝuroj. Iuj domoj havas bele lignogravuritajn arkadojn. Sur la muroj kaj volboj estas grandaj gipsaj reliefoj de lotusoj kaj sunfloroj. La ornamaĵoj de la konstruaĵoj estis aranĝitaj harmonie. La moskeo Aitiga kaj la Maŭzoleo de Xiangfei plej bone enkorpigas en si la karakterojn de la uĝura arkitekturo.

La moskeo estis konstruita en 1838 kaj okupis areon de 1 hektaro. Ĝi estas la plej granda moskeo en Xinjiang kaj povas enteni 6 000—7 000 homojn. La tuta konstruaĵo konsistas el turo, preĝejo kaj korto. En la korto staras altaj poploj. 140 verdaj gravuritaj kolonoj subtenas la blankan tegmenton de la majesta preĝejo. Dimanĉe en la moskeo svarmas piaj islamaj uĝuroj; kaj en la tradiciaj festoj oni ludas en kaj ekster la moskeo tamburojn kaj aliajn muzikilojn.

Kvin kilometrojn oriente de Kashi estas la Maŭzoleo de Xiangfei. Ĝi fakte estas grandioza tombokonstruaĵo, en kiu troviĝas 58 tomboj de Abake Huozhuo, gvidanto de iu sekto de islamismo, kaj liaj posteuloj. En 1440-1840 tiu familio praktike regadon super Xinjiang en politiko kaj religio. La pranepino de Abake Huozhuo estis prenita de la imperiestro Qianlong de Qing-dinastio en 1760 kiel lia kromedzino kaj ricevis la titolon Xiangfei. Post ŝia morto oni metis ŝiajn vestojn kaj ĉapon en ĝi kaj nomis la tombokonstruaĵaron Maŭzoleo de Xiangfei. La maŭzoleo havas altajn rondajn kolonojn kaj tombomurojn el buntaj klinkejoj. Dekstre de ĝi estas granda kaj malgranda preĝejoj ene kun delikate gravuritaj kolonoj kaj bele desegnitaj plafonoj. La tuta maŭzoleo impresas per majesteco.

MOVPLENA FOIRO

La urbo Kashi havas historion de pli ol 2 000 jaroj. En la antikveco ĝi estis grava pasejo

de Ĉinio al Hindio, centra Azio kaj la Proksima Oriento kaj eĉ al Eŭropo. Al tiu urbo ofte venis komercistoj el la antikvaj Grekio kaj Romio por aĉeti ĉinajn silkajojn. Ĝi estis unu el la plej fruaj internaciaj merkatoj de Ĉinio. Nun la tradicia foiro en Kashi restas ankoraŭ movplena kiel antaŭe.

Iun frumatenton mi venis al la foiro. La stratoj estis homplena. La viroj portis senkoluman robon, broditan ĉapon kaj botojn. La knabinoj portis verdan veŝton, koloran jupon kaj gazan kaptukon. Severe observante la islaman doktrinon, la maljunulinaj ankoraŭ vualis sin per

metiartajoj por elekte aĉeti ornamajojn el oro kaj arĝento, dum knaboj konkure elektis por si tranĉiletojn. Sed, la plej interesa por mi estis la ĉapo de uĝuroj. Ĝi estas unu el la ĉefaj uĝuraj vestaĵoj kaj havas formon rondan aŭ kvadratan. La vira ĉapo havas simplan koloron kaj liberstilajn desegnaĵojn. La virina ĉapo el verda veluro surhavas orfadene broditajn floretojn kun perloj aŭ perlamatoj kaj rebrilas sub la suno.

Kashi estas fama tra la tuta Xinjiang pro sia produktado de tiaj ĉapoj. Respondeculo de iu ĉapfarejo diris al mi, ke ĝiaj produktajoj ne povas kontentigi la

ombratan de verdaj arboj, agrabla aromo karesis nian nazon. En la korto estis koridoro de vinberujoj. Vidante nian alvenon, la mastrino elpaŝis ridete kaj sin klinis kun la dekstra mano sur la brusto, dirante: "Bonan tagon!" Reciprokinde la saluton, ni sekvis ŝin kaj eniris en vastan puran ĉambron. Sur la malalta terlito sterniĝis dika felto, kaj sur muroj tri-flankaj pendis helkoloraj murtapiŝoj. Antaŭ la fenestro estis meblita porcelana longkola kruĉo kun bluaj strioj sur la blanka fono kaj ovala porcelana plado. Tio estis familio de ordinara kamparano. Tiun momenton la mastro revenis de sia fruktoĝardeno. Li nomiĝas Maihamuti, pli-ol-60-jara. Li varme manpremis nin kaj poste invitis nin runde sidi sur la terlito kun krucitaj kruroj laŭ la moro de uĝuroj. La mastrino metis blankan tablotukon inter ni kaj ŝia filino alportis *kaŭnang* kaj laktoteon. *Kaŭnang* bakita el faruno, kun grandeco de telero, servas kiel ĉefmanĝaĵo de uĝuroj. La bongusta laktoteo estas preparita el bovinlakto, bruna teo kaj malmulta salo.

Tagmeze la mastro regalis nin per uĝuraj aparta rizaĵo kaj ŝafaĵo en grandaj pecoj. La preparo de tia rizaĵo estas neordinara: Unue meti buljonon kaj vegetalan oleon en la rizon kaj kuiri ĝin helflava, poste miksi kun la rizaĵo karotajn striojn, sekigitajn vinberojn, terpomon kaj ŝafajon kaj daŭre kuiri ilin per milda fajro ĝis pretiĝo. Antaŭ manĝo la mastro alportis kruĉon da akvo, por ke ni trifoje lavu niajn manojn, kaj poste li donis al ni ekzemplon kiel manĝi: Li pinĉis la rizaĵon per kvar fingroj, kunpremis ĝin en bulon kaj poste metis ĝin en la



Vendataj kaŭnang en la foiro

bruna kaptuko. La foiro okupis ĉefe la du rektajn stratojn sudoriente de Aitiga-placo. La vendejoj ambaŭflanke de la stratoj estis abundaj je ŝtofoj, katunoj, ĉiutagaj bezonaĵoj kaj aliaj objektoj, sur standoj kuŝis eleagnofruktoj, vinberoj kaj retmelonoj, kaj en budoj estis montrataj uĝuraj manĝaĵoj kun aparta gusto. Uĝuraj knabinoj kunpremiĝis antaŭ standoj de

bezono de merkato, ĉar tiaj ĉapoj jam fariĝis ne nur bezonaĵoj de ĉiuj uĝuroj, sed ankaŭ metiartajoj ŝatataj de ĉinaj kaj alilandaj turistoj.

GASTAMA MASTRO

En serena antaŭtagmezo mi vizitis familion de uĝura komunumano, kune kun mia amiko, kiu bone scias la hanan lingvon. Antaŭ ol ni eniris en la domon

Interesaj komunikaj rimedoj

En Kamerunio, meze de Afriko, loĝas pli ol 200 triboj, ĉiu kun siaj tradicioj kaj moroj. Inter ili troviĝas la granda Bamileka Tribo kun miliono da membroj, kiuj koncentre loĝas en la okcidenta parto de la lando. De jarcentoj, kun la historia evoluo kaj media ŝanĝiĝo bamilekoj dividiĝis en du grupojn, kiuj nun ankoraŭ uzas siajn originalajn komunikajn rimedojn. Unu el la du rimedoj estas efektivigita per tamtamo, korno, arkebuzo, bambua fluto kaj aliaj instrumentoj dum la alia per malsamaj voĉoj.

La tieaj tamtamoj konsistas el la jenaj tri specoj: la unua nomiĝas "Enka". Ĝi estas farita el trunkpeco traborita kaj muntita ĉe unu ekstremo per ledo kaj ĉe la alia per tripiedo. Oni batas la ledon permane. Tri sinsekvaj batoj estas signalo de danĝero kaj kvin — de kunveno. La alia estas nomata "Endu". Ĝi estas farita el trunkpeco kun kavo je unu metro profunda kaj je 30 centimetroj en diametro, ankaŭ la aperturo estas kovrita per ledo, kiun oni batas per paro da lignaj batiloj por fari alarmon al batalo. La tria estas nomata "Enta Mup", farita el trunkpeco unue traborita kaj poste kovrita per ledo ĉe ambaŭ ekstretoj. Ankaŭ ĝi servas por la sama celo kiel la aliaj du specoj.

tenu la amindan hejmlandon en sia memoro, kie ajn li estas en la mondo." La vortoj de la mastro tre kortuŝis min. Jes, la hodiaŭa feliĉa vivo, kiun ni ĝuas nun, estas akirita ne facile. Ni devas ami ĝin!



La Maŭzoleo de Xiangfei

buŝon. Tia rizajo estas ne tro grasa, sed brilkolora kaj apetitiva. Oni kutime preparas tian rizajon nur por geedziĝa aŭ funebra ceremonio, la Novjaro aŭ regalo de honorindaj gastoj.

Post la tagmanĝo la mastro gvidis nin al sia malgranda fruktoĝardeno. En ĝi kreskas akvomelonoj, retmelonoj, vinberujoj, persikarboj, pirarboj kaj pomarboj, kiuj estas riĉaj je fruktoj kaj eligas allogan aromon. Kiam mi alproksimiĝis al malalta prospera figarbo, la mastro diris, ke tia arbo estas tre interesa, ke ĝi fruktas printempe kaj ĝiaj fruktoj maturiĝas aŭtune. Li deprenis unu figon kaj frapetis ĝin surmane, kaj elfluis flava suko. Li petis min ĝin gustumi. Mi suĉis la sukon kaj trovis, ke ĝi estas aroma kaj bongusta. Li demandis min: "Ĉu ĝi estas amara?" Skuante la kapon, mi diris: "Dolĉa, tre dolĉa!" Post mia respondo li tuj mienis malserene. Mia ujugura amiko tuj klarigis al li, ke mi

unufoje vizitas la regionon. Sekve, la maljunulo denove ekhavis sian ridantan mienon kaj rakontis al ni la jenan historieton. Antaŭ longe tie estis nur dezerta sablejo kaj lago. Granda riĉulo elektis tiun lokon kiel sian bienon kaj pelis multe da sklavo por ekspluati la teron. La kruelaj subpremado kaj torturo kaŭzis sangan batalon de la sklavo kontraŭ la riĉulo. Venkis la riĉulo, sed la sklavo preferis sin dronigi en la lago ol subiĝi. Post kelkaj jaroj sekiĝis la lago, kaj el la fundo elkreskis arboj unu post alia, kiuj nur fruktis sed ne floris. La oraj fruktoj estis rigardataj kiel la venĝema koro de rezistantoj kontraŭ la malamiko kaj ĝiaj ruĝaj vejnoj kiel la venĝema fajro. La maljunulo suspire diris: "Tio estas legendo. La ujuguraj frukto-kulturistoj havas kutimon: kiam familiano ekvojaĝas al alia loko, li devas manĝi unu figon kaj nepre diri 'ho, amara', por ke oni ne forgesu la pasintajn amarajn tagojn kaj

Korno, ĝenerale bova aŭ alibesta, estas uzata ĉefe en la batalo. Oni kornas ĉe la komenco kaj fino de batalo. Arkebuzo estas fusilo, per kiu oni pafas por alarmo en la batalo aŭ por amuziĝo en la festa tago. Per bambua fluto oni komunikas nur siajn proprajn sentojn inter du personoj.

Se instrumentoj estas uzataj ĉefe por komuniki informojn al kolektivo, do "voĉoj" povas esti kalkulata kiel "parolo" inter du personoj.

En placo, bazaro aŭ aliaj publikaj lokoj, se oni volas voki iun kaj ne devas voki ties nomon, li eligas la sonon "hasi". Se la vokato estas amiko preskaŭ samaĝa, oni do vokas lin per "ji-ji" aŭ "u-u".

La voĉa sono "enkab", eligata helpe de la lipoj kaj manoj, estas plej vaste uzata de la plenkreska viro. Ĝi povas esti akuta aŭ obtuza laŭbezono. En milito ĝi funkcias kiel signalo de komenco aŭ fino de batalo samkiel korno. Oni ĝin uzas ankaŭ por levi la batalspiriton de soldatoj kaj kolapsigi la malamikojn. Ĉasistoj ofte eligas tian sonon por kontakti kun malproksimaj kolegoj aŭ inciti ĉashundojn dum ĉasado.



Bamileko

Bongusta frukto

"Kiu goron al ni donas, vivon alportas," tiel diras proverbo de

Ibo-tribo en Niĝerio. Okcidentafrikanoj tre ŝatas goron, kvankam ĝi ne estas tiel fame konata kiel kakao kaj kafo. Precipe por niĝerianoj, ĝi estas tre populara kaj absolute nemankigebla.

Goroarbo, kies guŝo entenas 10-20 grajnoj, apartenas al ligneca planto. Ĝia palruĝa aŭ blanka senŝela grajno estas simila al kaŝtano, sed iom pli granda. Ĝi estas dolĉa, sensoifiga kaj samtempe ekscitiva pro la entenata kafeino. Precipe en dezerto, kie regas arda suno kaj sekego, la goro estas bona refreŝigaĵo, se oni maĉas ĝin. Pro sia magia efiko ĝi ne nur estas tre ŝatata de la lokanoj de la okcidenta Afriko, sed ankaŭ havas grandan debiton en interna Afriko. Oni eksportas ĝin eĉ en Eŭropon kaj Amerikon.

En Niĝerio la haŭsa-anoj havas tiel grandan ŝaton por goro, ke ili senescepte portas en sia poŝo la frukton por ĝin ĝui, eĉ dum vojaĝado aŭ en sia oficejo.

Goro estas tradicia frukto por regali gastojn en Niĝerio. Ĝi estas simbolo de sincera amikeco. Kiam gastoj venas, gemastroj antaŭ ĉio regalas ilin per tia frukto. Manĝo de la goro estas rigardata kiel respondo al la varma akcepto de gastigantoj. Maĉante ĝin, oni babiladas pli intime.

Goro estas ankaŭ simbolo de amo. Je la fianĉiĝo aŭ geedziĝo la amanto ĉiam donacas al sia amatino tian frukton. Antaŭ la geedziĝa ceremonio la novedzo donacas ĝin al siaj parencoj, dum la novedzino donacas ĝin al la siaj. Alie, oni opinias, ke li aŭ ŝi ne estas ĝentila.

Specifa signo de policanoj en Milano

Sur la stratoj de Milano, Italio, ofte videblas policanoj, ĉe kies maldekstra maniko de la uniformo estas alkudrita ornamaĵo de alinaciaj flagetoj, ekzemple, brita, franca

kaj hispana. Fakte, la flageto estas la signo, kiun fremdan lingvon la policano scipovas paroli por rekte servi al la turistoj venantaj el la koncerna lando.



Policano kun maniko ornamita per la brita flageto

Estas prospera la turismo en Italio. En la kvar sezonoj de la jaro tien venadas turistoj, kaj Milano estas por ili urbo vizitenda. Tial, la urba instanco metas grandan atenton sur tion, ke trafikaj policanoj sciu fremdan lingvon. Nun jam triono de la policanoj de la urbo parolas unu aŭ eĉ plurajn fremdajn lingvojn. Tiu rimedo plivigligas la turisman aferon, plimultigas enspezon de la urbo kaj favoras al la fremdlandaj turistoj.



Inter la argilaj figuroj de Qin-dinastio

de YUAN ZHONGYI

La elterigo de la argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio altiris al si tutmondan atenton kaj estas rigardata kiel "la plej grandioza arkeologia eltrovo en la 20-a jarcento". La aŭtoro estas unu el la arkeologoj, kiuj partoprenis en la prifosado. En 1963 li finis sian studon en la klaso de esploranto-studento pri la ĉina antikva historio en la Orient-Ĉinia Instruista Universitato kaj eklaboris en la Arkeologia Instituto de la Provinco Shaanxi. Antaŭ ol sin okupi pri la elterigo de la menciitaj figuroj, li partoprenis en la fosado kaj esplorado de la tombo de Li Shou, nobelo de Tang-dinastio en la komenca periodo de la 7-a jarcento. Nun li estas 50-jara. Lia edzino laboras en mezlernejo kiel instruisto kaj lia filino estas unuaklasa studento en la kemia fakultato de la Nordokcidenta Universitato de Ĉinio.

—La Red.



La aŭtoro

Tute hazarde, sed interese estis trovi la argilajn militistajn kaj ĉevalajn figurojn de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiu estis ankaŭ la unua feŭda imperiestro en la ĉina historio. En historiaj libroj ne mankas notoj pri tio, ke la imperiestro komencis konstruigi sian maŭzoleon tuj post sia surtroniĝo en la aĝo de 13 jaroj. Tamen estas strange, ke tiuj libroj diris nenion pri la

fosoj kun argilaj figuroj, kiuj konsistigas parton de la maŭzoleo. En la tria tagdeko de marto, 1974, kiam lokaj kamparanoj fosis puton oriente de la maŭzoleo, ili trovis rompitaĵajn argilajn figurojn je 3 metroj sub la grundo. La novaĵo vekis atenton de la institucio pri historiaj objektoj. Oni konjektis, ke la trovitaj figuroj estas de Qin-dinastio. En julio arkeologia grupo el tri membroj — mi kaj miaj du kolegoj — estis sendita al la loko, kiu distancas de la urbo Xi'an je 35 km.

Verdire, ni tute ne esperis multon el nia prifosado siatempe, ĉar la loko estas 1 500 metrojn for de la maŭzoleo. Ni eĉ pensis, ke duonmonato jam sufiĉos por plenumi nian laboron. En la unuaj tagoj ni provizore starigis niajn tendlitojn ĉeloke, pendigis niajn kulvualojn sur arboj kaj prenis manĝojn ĉe

la hejmoj de lokaj kamparanoj. Kiu ja povus tiam atendi, ke sub la tero tie sin kaŝas la gvardio de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiu konsistas el 6 000-7 000 militistaj kaj ĉevalaj figuroj?

Eble iuj opinias, ke arkeologia prifoso estas nenio alia ol simpla elterigo de historiaj restaĵoj, sed fakte la laboro estas tre delikata kaj postulas grandan paciencon.

Por koni la direktiĝon kaj dimensiojn de la foso entenanta la argilajn figurojn kaj difini la amplekson por nia prifosado, ni faris milon da boradoj kaj esploris samplojn prenitajn el malsamaj tertavoloj. Ni fosis tre atente. Kiam argilaj figuroj elmontriĝis, ni zorgeme forbalais la teron de sur ili kaj faris mezuradojn, desegnadon, fotojn kaj detalajn notojn. Kaŭze de serioza detruo en la pasinteco, la militistaj kaj ĉevalaj figuroj plej-

parte ne estis kompletaj, kaj iuj el ili eĉ aperis kiel amaso da rompaĵoj. Por ilin restaŭri, ni devis distingi inter centoj da rompitaĵoj pecoj laŭ iliaj formoj, koloroj kaj dikeco kaj kungluis ilin en originajn figurojn. Foje-foje ni eĉ elspezis plurajn semajnojn por serĉi unu mankantan pecon.

La prifosado tiel daŭris kelkajn monatojn. La argilaj figuroj kaj bronzaĵoj bataliloj senĉese elteriĝis, kaj la tereno de nia borado kaj fosado pli kaj pli larĝiĝis, sed la rando de la foso ankoraŭ ne montriĝis. Ni vole nevole ekdubis, ĉu ĝi vere estas tiel granda. Ni reviziis nian esploron por eviti eventualajn erarojn. Post pli ol unu jaro ni fine venis al la konkludo, ke kiel parto de la maŭzoleo, la kavon estas 230 metrojn longa de oriento al okcidento kaj 62 metrojn larĝa de nordo al sudo, kaj ĝi kovras areon de pli ol 14 000 kvadrataj metroj kaj entenas pli ol 6 000 argilajn militistajn kaj ĉevalajn figurojn, kiuj estas preskaŭ en la sama grandeco kiel veraj homoj kaj ĉevaloj. Ni raviĝis pri tiu nekredbla fakto, ke per nia laboro ni trovis tian grandan maŭzolean kavon kun argilaj figuroj, kiam la mondo ĝis nun ankoraŭ ne konis. Poste ni trovis sinsekve en la proksimeco la fosojn numeroj 2 kaj 3, kiuj estas malpli grandaj.

Dank' al tiuj trovoj la loko, kiun oni apenaŭ povas trovi en ordinaraj mapoj, tuj altiris al si la atenton de la tuta mondo. Oni alvenis de diversaj partoj por pli frue ĝin rigardi. En sia artikolo Audrey Topin, kanada erudiciulino, priskribis sian unuan impreson pri la vizito: "Ni propraokule vidis la plej grandozan arkeologian eltrovon en la 20-a jarcento. . . Ĝi prezentis al ni

bildon, kiun oni ne povos forgesi dum sia tuta vivo. Starante en pluvo, ni tiam ekscitiĝis ĝis larmoj."


Por kontentigi la deziron de la en- kaj eksterlandaj vizitantoj, en 1976 la ĉina registaro decidis asigni grandan sumon al la konstruo de ĉeloka ekspona halo, kiu kovros la tutan kavon numero 1. Dank' al tio la vizitantoj povas vidi ne nur la elfositan parton de la batala formacio el vicoj da militistaj kaj ĉevalaj figuroj en la foso 4-5 metrojn profunda, sed ankaŭ nian irantan prifosadon. Tia konstruaĵo estas malofte videbla en la historio de la arkeologiaj protektado kaj eksponado. Ni bone konsciis la tutan gravecon de nia laboro. Ni fosis apenaŭ dekonon de la kavon numero 1, kiam oni komencis konstrui la eksponan halon. Kian perdon ni kaŭzus al la

ŝtato, se la halo konstruota estus tro granda aŭ malgranda, rezulte de la malprecizeco de la donitaĵoj de ni liveritaj! En tiuj tagoj forta konscio pri la respondecado maldormigis nin kaj instigis nin al ripeta revizio de nia materialo por akiri pli multe da sciencaj donitaĵoj.

En la 1-a de okt., 1979, la finkonstruita halo kun areo de du futbalaj terenoj malfermiĝis al la publiko. En tiu grandioza arkforma konstruaĵo aparte imponis la formacio de la militistaj kaj ĉevalaj figuroj kaj vekis admiron ĉe en- kaj eksterlandaj vizitantoj. En la pasintaj tri jaroj oni jam akceptis pli ol 3 milionojn da vizitantoj en la ekspona halo.

Kun la disvolviĝo de la laboro, kreskis ankaŭ nia arkeologia grupo. Anstataŭ tri membroj en la komenco, nun ĝi havas entute

La aŭtoro en prifosejo




ĉirkaŭ ducent, kiuj plejparte estas junaj. Post fundamenta trejnado kaj praktikado, ili jam povas lerte ordigi kaj ripari la elfosaĵojn. Mi ĝoje vidas, ke al niaj arkeologiaj laboroj ne mankos daŭrigantoj.

Krom fosi kaj ordigi la kavojn de la argilaj figuroj, ni ankaŭ faris esploradon, boradon kaj provfosadon al aliaj partoj de la maŭzoleo, tiel ke ni ne nur akiris fundamentan scion pri ĝia subtera dispozicio, sed ankaŭ trovis multe da valoraj historiaj restaĵoj. Interalie du grupoj da bronzaĵoj, ĉevaloj kaj koĉeroj estas la plej grandaj, plej longe kaj bone konservitaj el la similaj bronzaĵoj trovitaj en nia lando. Nun ili estas riparataj kaj baldaŭ eksponiĝos publike.

Samtempe ni esploris niajn elfosaĵojn. Ni trovis, ke ĉiuj argilaj figuroj havas sian propran aspekton, kaj tio forte min interesis. Post longa observado mi nombris inter ili pli ol dudek vizaĝ-tipojn kaj pli ol cent malsamajn mienojn, pri kio mi skribis materialon el kelkcent mil ĉinaj ideografiaĵoj. En la esplorado ni bezonis sciojn pri militaj aferoj, skulpturo, antikva armilaro ktp., kiuj mankis al mi. Mi do turnis min al diligenta legado. Mi legis ĉiujn koncernajn verkojn, kiujn mi sukcesis akiri, kaj la gravajn el ili mi eĉ plurfoje legis.

Surbaze de atentema observo kaj diligenta lerno mi faris monografiajn studojn pri la signifo kaj valoro de la elterigo de tiuj argilaj figuroj, pri la aranĝo de ilia formacio kaj armilaro, pri ilia skulpturo ktp., kaj publikigis dekkelke da disertaĵoj en ĵurnaloj en- kaj eksterlandaj. En la pasinteco oni ĉiam opiniis, ke sub la influo de



Parto de la argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj

la budhisma arto la ĉina skulpturo komencis disvolviĝi en la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj en la 5-a kaj 6-a jarcentoj. Post esplorado de la argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj, mi elmetis novan tezon en mia disertaĵo “Unuapaŝa Studo pri la Skulpturo de Argilaj Figuroj de Qin-dinastio”. Mi opinias, ke en Qin-dinastio skulpturo jam maturiĝis kaj, kiel la artisma nivelo de la elterigitaj figuroj pruvis, tiam aperis la unua alta tajdo en la historio de la ĉina skulpturo. Mia disertaĵo tuj vekis la atenton de akademiaj rondoj en Ĉinio. Cetere, baldaŭ plenumiĝos ankaŭ mia monografia verko “La Argilaj Figuroj de Qin-dinastio” el pli ol 200 000 ĉinaj ideografiaĵoj.

Kiel la ĉefurbo en 11 dinastioj, Xi'an kaj ĝia ĉirkaŭaĵo abundas je subteraj historiaj objektoj. En la lastaj kelkaj jaroj miaj kolegoj aktivadis sur aliaj terenoj de arkeologia prifosado kaj akiris multe da brilaj fruktoj. Ekzemple, en la gubernio Dali oni trovis fosiliajn kraniojn de prahomoj vivantaj antaŭ 100 000-200 000 jaroj; en la vilaĝo Jiangzhai de la gubernio Lintong oni trovis bone konser-

vitan postsignon de primitiva vilaĝo antaŭ 6 000 jaroj; ĉe la ruino de la imperiestra palaco en Xianyang, la ĉefurbo de Qin-dinastio, oni elfosis grandan nombron da valoraj historiaj restaĵoj kaj najbare al la maŭzoleo de la imperiestro Wudi de la Okcidenta Han-dinastio oni elterigis grandan oritan bronzan ĉevalon, bambu-forman incensujon kaj aliajn historiajn valorajojn. Mi ne povis persone partopreni en tiuj prifosoj, sed ĉiuj tiuj fruktoj de arkeologia laboro same min ekscitis kaj ĝojigis.

La laboro de niaj arkeologoj estas peniga, tamen interesa kaj plezuriga. Ĉiun duan semajnon mi veturis hejmen en Xi'an por pasigi miajn liberajn tagojn kune kun miaj familianoj. Mia edzino Liu Yu, instruistino de historio en la 86-a Mezlernejo en la urbo Xi'an, varme subtenas mian laboron, prenante sur sin la tutan mastrumadon. Ĉiufoje, kiam mi revenis hejmen, ŝi petis min rakonti pri la progreso de nia arkeologia prifosado. Iafoje ni diskutis inter ni pri iu aŭ alia problemo. Krome, ni ambaŭ ŝatas ludi ŝakon, kaj senescepte nia filino ĉiufoje aliĝis al nia ludo.

La kamparana insurekcio kaj la naskiĝo de la Orienta Han-dinastio

de BA HONG

SOCIA KRIZO EN LA LASTAJ JAROJ DE LA OKCIDENTA HAN-DINASTIO

Meze de la unua jarcento a. K., la ekonomio de la Okcidenta Han-dinastio prosperis senprecedence, sed poste aperis serioza socia krizo. Tiam, pli kaj pli multaj tiranaj bienuloj senbride prirabis kampojn de kamparanoj trouzante siajn fortojn politikajn kaj ekonomiajn, samtempe la grandaj metiej-posedantoj kaj komercistoj profitegis de la uzuro. Kaŭze de tio, grandnombraj kamparanoj bankrotis kaj fariĝis sklavoj de bienuloj, dum la nobeloj vivis lukse.

En 1968 ĉinaj arkeologoj pri-fosis en Mancheng-gubernio, Hebei-provinco, grandan tombon de la Okcidenta Han-dinastio, en kiu troviĝis la geedzaj Liu Sheng, princo dum la regado de la imperiestro Wudi. La princo mortis en ĉ. 113 a. K. En la tombo estis pli ol 2 800 valoraj objektoj, inter kiuj estis du jadaj vestoj faritaj el 4 658 jadpecoj kunligitaj per oraj fadenoj, pezaj je 1 800 gramoj. Tio montris la mirigan lukson de la tiamaj nobeloj.

Ankaŭ milito ege damaĝis la popolan vivon. La imperiestro Wudi (140-87 a. K. en potenco) kondukis militon dum dekoj da jaroj kontraŭ la hunoj en la nordo, kio kvankam fortikigis la centralizisman ŝtaton, tamen re-

zultigis konsumon de grandkvanta riĉaĵo kaj perdon de duono de la loĝantaro pro la senĉesa kreskado de militaj elspezoj kaj senbrida varbado de kamparanoj en la armeon. Pli kaj pli multaj homoj fariĝis sklavoj kaj estis vendataj kiel brutoj. La popolamasoj ne povis tion toleri kaj multfoje leviĝis kontraŭ la regado de la Okcidenta Han-dinastio.


MALLONGA DINASTIO

Kiam la Okcidenta Han-dinastio troviĝis en serioza krizo, Wang Mang, nevo de la edzino de la imperiestro Yuandi (48-33 a. K. en potenco), uzurpis la tronon per sia potenco kaj fondis Xin-dinastion (9-23 p. K.).

Wang Mang estis lerta en flatado, tial li gajnis plenan konfidon de la imperiestro. Dum la regado de la imperiestro Pingdi (1-5 p. K. en potenco), kun la titolo Dasima (altranga oficisto por direkti la ŝtatajn kaj militajn aferojn) li kaptis en siajn manojn la regadon de la kortego. Poste li venenis la imperiestron Pingdi. Li surtroniĝis en 9 p. K. ŝanĝinte la nomon de la dinastio per Xin.

Por savi la landon el la krizo, Wang Mang praktikis serion da reformoj. Li deklaris, ke ĉiuj privataj kampoj de la lando apartenas al la imperiestro, la kampoj estas dividitaj laŭ lo-

ĝanto-nombro, granda familio kun malpli ol ok viroj, kiu posedas pli ol 60 hektarojn, devas doni la superfluaĵn kampojn al siaj parencoj kaj najbaroj sen kampoj; paro da senkampaj geedzaj povas ricevi 6.6 hektarojn da kampoj. Li difinis, ke estas malpermesate vendi kampojn kaj sklavojn. Li formale volis limigi centralizon de kampoj kaj vendon de sklavoj, sed fakte li nur transdonis la kontraŭlegajn kampojn posedatajn de tiranaj bienuloj al registaroj tenataj de la tiranaj klikoj de lia familio kaj la kamparanoj ne ricevis kampojn. Aliflanke, ĉar li deklaris, ke ankaŭ la kampoj de memkulturaj kamparanoj apartenas al la imperiestro, se tiuj kamparanoj vendus siajn kampojn por vivteni sin, do ili kune kun sia familio devus esti ekzilitaj al malproksima loko kaj eĉ kondamnitaj al morto. Tio tamen akcelis bankroton de tiuj kamparanoj. Tial tiuj reformoj kaŭzis kontraŭstaron ne nur de tiranaj bienuloj sed ankaŭ de la kamparanoj. Post tri jaroj Wang Mang devigite abolis tiujn dekretojn por reformo. Krome, li ankaŭ faris mon-sisteman reformon. Dum 15 jaroj li faris tion kvinfoje, sekve la kupraj moneroj fariĝis ĉiam pli malgrandaj dum iliaj nominalaj valoroj ĉiam pli grandaj, tial la varprezoj altiĝis senbride kaj malgrandaj metiistoj kaj komercistoj bankrotis grandnombro.



Kunyang-kampanjo

La dekkelk-jara reformo de Wang Mang ege damaĝis la tutlandan ekonomion. La produktaj fortoj de la socio suferis tre grandan detruon, la stato de la kamparanoj fariĝis pli mizera, pli da kamparanoj perdis sian teron kaj fariĝis sklavoj.

Wang Mang multfoje faris konskripcion kaj kondukis militon kontraŭ nacimalplimulto en la nordo, nordoriento kaj sudokcidento, kiu kaŭzis al la popoloj de ĉiuj naciecoj grandan suferon kaj mizeron. La kamparanoj kaj sklavoj ne povis vivi plu, kaj fine eksplodis granda insurekcio de la kamparanoj en la tuta lando.

INSUREKCIAJ ARMEOJ LULIN KAJ CHIMEI

Inter la insurekciaj armeoj Lulin kaj Chimei estis pli fortaj. La insurekcia armeo kun 50 000 homoj gvidata de Wang Kuang kaj Wang Feng ĉe la monto Lulin de la provinco Hubei estis nomata Lulin-armeo. Ĉe la monto Taishan en Shandong-provinco estis alia insurekcia armeo gvidata de Fan

Chong, kiu konsistis el pli ol 100 000 homoj. En militado ili ruĝigis siajn brovojn. Tial la armeo ricevis la nomon "Chimei-armeo" (Ĉinlingve "Chimei" signifas ruĝajn brovojn — Trad.). Krom ili, militis ankaŭ sendepende multaj aliaj insurekciaj armeoj grandaj kaj malgrandaj, ĉiuj kune nombris milionojn da homoj.

Samtempe kun tio, ankaŭ tiranaj bienuloj en diversaj lokoj unu post alia formis siajn armeojn kontraŭ la reĝimo de Wang Mang, inter ili la plej potenca estis la armeo gvidata de Liu Xiu kaj Liu Xuan — membroj de la imperiestra familio de Han-dinastio. Ili poste alianciĝis kun la armeo Lulin kaj la armeo rapide disvolviĝis kaj la armeo nombris pli ol 100 000 militistojn. Ili elektis Liu Xuan kiel imperiestron kun la titolo Gengshi.

KUNYANG-KAMPANJO

Wang Mang rigardis la armeon Lulin gvidatan de la imperiestro Gengshi kiel danĝeran malami-

kon kaj la aliajn insurekciajn armeojn kiel banditojn. En la jaro 23 p. K., li nomumis Wang Xun ĉefkomandanto kaj sendis 420 000 militistojn por tuj ekstermi la insurekciajn armeojn Lulin.

Wang Xun sieĝis la gravan urbon Kunyang (la nuna Yexian-gubernio, Henan-provinco) okupitan de la insurekcia armeo per fortaj trupoj kaj atakis ĝin senhalte. La urba defendtrupo nombris nur 8 000-9 000 militistojn. Vidante, ke danĝera estas sola defendo, la trupo decidis sendi Liu Xiu kun 12 bravuloj rompi la sieĝon en nokto por venigi helpan trupon.

Liu Xiu rompis la sieĝon kaj venigis 3 000 militistojn por sturmi la sieĝantan armeon. Rimarkinte, ke li gvidas nur malgrandan nombron da militistoj, Wang Xun malstreĉis la singardemon kaj sendis 10 000 militistojn batali kontraŭ Liu Xiu. Sed la bravegaj batalantoj de Liu Xiu rekte sturmis la ĉefkomandantojn de Wang Xun kaj lin mortigis. La granda armeo de Wang Xun perdis sian koman-

danton kaj diskuris panike, nur kelkmil militistoj revenis al Luoyang. Tio estis la fama Kunyang-kampanjo, kion konas la ĉina historio, en kiu malgranda armeo venkis la grandan.

NASKIĜO DE LA ORIENTA HAN-DINASTIO

La ĉefaj fortoj de Wang Mang estis ekstermitaj en Kunyang-kampanjo. En septembro tiujare la insurekcia armeo konkeris la ĉefurbon Chang'an, kiam estis mortigita Wang Mang mem. Tiel disfalis Xin-dinastio, kiu

ekzistis nur 15 jarojn.

La imperiestro Gengshi, gvidanto de la armeo Lulin, degeneris tuj post eniro en la ĉefurbon, li tage kaj nokte diboĉis en la palaco kaj ne traktis la ŝtatajn aferojn. Tial la regado farigis pli putra ol tiu en la periodo de Wang Mang, pri tio la popolo malesperis ekstreme.

En la jaro 25 p. K. alia insurekcia armeo Chimei konkeris la ĉefurbon, la imperiestro Gengshi kapitulacis al ĝi. La armeo Chimei devigite retiriĝis orien-

ten pro manko de nutraĵoj. Sed malfeliĉe ĝi trafis embuskon de Liu Xiu en Henan kaj estis tute ekstermita.

En la sama jaro la reprezentanto de la tiranaj bienuloj Liu Xiu surtroniĝis en la nomo de posteulo de la Okcidenta Hاندinastio en Hao (norde de la nuna Baixiang-gubernio, Hebeiprovinco) kaj poste prenis Luoyang kiel ĉefurbon. Ĉar Luoyang situis oriente de Chang'an, tial la historiistoj nomis la novan imperion Orienta Hاندinastio.



Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Hans-J. Bibiko (14j. lernanto) kaj Klaus-P. Bibiko (22j. studento) dez. kor. kun ĉinaj geesp-istoj pri Ĉinio, fremdlingvoj ktp., kol. b.k., DDR-3027 Magdeburg, Pflafferstr. 33.

* 24-jara litova fraŭlo dez. kor. kun diversaĝaj geesp-istoj el tuta mondo kaj interŝ. kolorajn bildkartojn, diskojn, poŝtmarkojn ktp. Respondo certa. Adreso: Laimius Traznickas, Topoliu 4-41, 234580 Alytus-3, Lithuanian USSR.

* Irana f-ino Bahare Piri, Lederly Compani, Gandhi, St. 25th St.,

No. 3 Tehran, 15, Iran, dez. kor. tutmonde pri arto, literaturo, precipe poemaro kaj infana edukado. (kun sia foto)



* Jan Ilavaky (30j.), Šrobarova 2668/27 bl. Odra, 058 01 Poprad Ĉeĥoslovakio, interesas pri historio, geografio kaj arto de la tuta mondo, kolektas malnovajn kaj samtempajn paĝilojn, monerojn, bankbiletojn, bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun artaj bildoj.

* Robert D. Wood, 1312 West 5th Street, Tempe, Arizona 85281, Usono, deziras korespondi kun amikoj pri sporto kaj bildoj de ĉiuj landoj.

* Malgorzata Jurkiewicz, Wroclaw, Str. Kruszwicka 8/63 Pollando,

dez. kor. pri literaturo, filmo, popolmoroj kun tuta mondo, speciale kun ĉinoj kaj japanoj pri orienta kulturo.

* Marian Ezafraniec (32j.), ul. Janowska 72, 41-400 Myslowice, Pollando, vol. kor. kun ges-anoj el Ĉinio kaj sud-azio pri historio, geografio, spiritismo kaj kolektas p.m. kaj b.k.

* 20-jara polino, Barbara Wlodarczyk, 24-200 Beżzyce, ul. Ogrodowa 8, vol. leter-kontaktas kun geamikoj pri sporto, junulara muziko ktp.

* Dako Erzsebet (16j.), Str. N-Balcescu No. 92, Ditrau, Hargluta, 4214, Rumanio, dez. kor. kun amikoj, ĉefe el Ĉinio, Hungario, Francio, Anglio pri diversaj temoj.

* Csiti Maria-Magdolna (16-jara), Str. Napsugar No.7, Ditrau, Hargluta, 4214, Rumanio, dez. kor. kun amikoj ĉefe el Ĉinio, Hungario, Francio pri diversaj temoj.

* Simon Evzsebet (15-jara), Str. N-Balcescu No.89, Ditrau, Hargluta 4214, Rumanio, dez. kor. kun amikoj ĉefe el Ĉinio, Hungario, Francio pri diversaj temoj.



ĈINIO KOVRIS LA DIFERENCON DE PAGOJ POR ĈIUTAGAJ VIVBEZONAĴOJ

Kiel informis la Stata Planada Komisiono de Ĉinio, en la tri jaroj de 1979 ĝis 1981 la ŝtato elspezis 62.8 miliardojn da juanoj por kovri la diferencon inter la ŝtataj elspezoj kaj la pagoj de urbaj loĝantoj por iliaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj, dom-luo, veturado, kuracado k.a. Sole en 1981 la ŝtata kompenso atingis 25 miliardojn da juanoj, preskaŭ trione kiom la totala laborpago de la tutlandaj salajruloj, kaj ĉiu urba loĝanto profitis meznombro 164 juanojn.

PORLABORAJ KOMPANIOJ FONDITAJ EN ĈINIO

Antaŭ la fino de 1981 Ĉinio fondis 7 686 porlaborajn kompaniojn en 210 urboj kaj 2 100 guberniaj urboj. La kompanioj laborigis pli ol 3.2 milionojn da gejunuloj. En la pasintaj du jaroj po tricent mil gejunuloj estis diversmaniere trejnitaj de la kompanioj, antaŭ ol havi okupon. Poste oni trejnos pli da senlaboruloj. La kompanioj praktikas duonlaboran kaj duonlernan sistemon. Post la lernado oni ekzamenas la trejnitojn kaj rekomendas la elstarajn al iuj entreprenoj.

ĈINAJ GIMNASTOJ EN LA MONDPOKALA KONKURSO

La Sesa Mondpokala Gimnastika Konkurso okazis inter la 22-a kaj la 24-a de oktobro 1982, en Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio, Jugoslavio. Ĝin partoprenis dudek elstaraj sportistoj el naŭ landoj. Ili havis kunmetitan kaj po-gimnastilan viran kaj virinan konkursojn je dekdu sportbranĉoj.

En la konkurso ĉinaj sportistoj gajnis sep orajn, du arĝentajn kaj kvar kuprajn medalojn, t.e. ili gajnis la ĉampionecon kaj subĉampionecon de vira kunmetita individua konkurso, la ĉampionecon de viraj grundgimnastiko, ĉevalado,

duringado, senansa ĉevalado kaj rekado kaj la subĉampionecon de virina trabado. La ĉinaj gimnastoj unufoje atingis tian grandan sukceson. Sovetunia gimnasto gajnis la ĉampionecon de paralelado kaj alia sovetunia gimnasto ĉampionecon de duringado paralele kun ĉina gimnasto. Sovetuniaj gimnastinoj gajnis tri ĉampionecon. Gimnastino de DR Germanio gajnis unu ĉampionecon.

Post la konkurso la prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato sendis gratulajn telegramojn al la prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato kaj la ĉina membro de IOK.

GUO YUEHUA DENOVE GAJNIS LA TABLOTENISAN ĈAMPIONECON

En la Tria Mondpokala Tablotenis Turniro okazinta en oktobro 1982 en Hongkong, la ĉina tablotenisisto Guo Yuehua refoje gajnis la ĉampionecon, venkinte per 3:0 la eŭropan ĉampionon, svedan novulon Mikael Appelgren. Alia ĉina tablotenisisto Xie Saike gajnis la trian lokon. La prezidanto de la Internacia Tablotenisa Federacio donis pokalon al Guo Yuehua.

LIU SHILAN GAJNIS LA TITOLON DE GRANDA MAJSTRO

La ĉina ŝakistino Liu Shilan fariĝis la unua ĉina granda majstro, post kiam ŝi gajnis la trian lokon per naŭ poentoj en la Virina Interregiona Ŝaka Turniro okazinta en la komenco de oktobro 1982 en Tbiliso, Sovetunio. Tiel ŝi ricevis rajton partopreni en la ŝaka finalo okazonta en januaro kaj februaro 1983. Laŭ la reguloj de la Internacia Ŝaka Federacio la unuaj tri gajnintoj en la turniro estis honoritaj per la titolo de granda majstro.

La turniron partoprenis dek kvin elstaraj ŝakistinoj, inkluzive de kvar grandaj majstroj, el dek eŭropaj, aziaj kaj amerikaj landoj. Rumana kaj sovetunia ŝakistinoj gajnis respektive la unuan kaj duan lokojn.

IMPORTO DE EKSTERLANDAJ TEKNIKOJ

Ekde 1979 Ĉinio streĉe faras importon de alilandaj avangardaj teknikoj anstataŭ tiun de kompletaj serioj de eksterlandaj maŝinoj por ekipi fabrikojn kaj emfazas uzi la importitajn teknikojn kaj ŝlosilajn ekipaĵojn por transformi ekzistantajn industriajn entreprenojn.


En la lastaj tri jaroj Ĉinio importis 158 teknikajn detalojn por la maŝina, elektrona, karba, elektra, kemia, tekstila, malpeza kaj aliaj industrioj, inkluzive teknikojn por fabriki 300 000-kilovattajn kaj 600 000-kilovattajn generatorarojn kaj 500 000-voltajn transformatorajn ekipaĵojn, por fabriki kombajn kaj malrapidajn porŝipajn dizelajn motorojn. La importitaj teknikoj helpas altigon de la teknika nivelo de la ĉina maŝina industrio, altigon de la kvalito de produktaĵoj kaj multigon de iliaj specoj.



- * Belajn kaj interesajn ĉinaĵojn sendas ŝanĝe prefere kun nutraĵoj Pentti Tormala, Hevonselka, SF-07170 Pornainen, Finnlando.
- * 18-jara lernantino dez. kor kun gejunuloj tutmonde pri ĉiuj temoj. Heidi Sommer, Jm Winkel 6, 7910 Neu-Ulm/Holzschwang, Germanio.
- * Iamaj ĉeestintoj ne denaske francparolantaj en ŝvarckabaretaj prezentaĵoj skribu Marie-Thérèse LLOANCY, 5 rue Léonard Constant, 64000 PAU, Francio.
- * Kadre de Lika Biblioteko ni fondis Esp-an Sekcion. Ni bezonas diversspecajn materialojn — libroj, gazetoj, broŝuroj ktp. Ĉiuj donaculoj ricevos dank-respondon, sendu al: Polski Związek Esperantystów, Biblioteka Sekcio, PL-67-400 Wsxhowa, Str. Swierczewskiego 1, Pollando.

Maŭ Zedong:

Poemoj




Maŭ Zedong estas mondfama politikisto, revoluciulo kaj ankaŭ poeto. Li estas bone konata kiel gvidanto de la ĉina revolucio, sed liajn poemojn scias ankoraŭ ne multaj. Jen estas la leginda poemaro, kiu enhavas liajn 36 poemojn verkitajn inter 1925 — 1965. La tradukoj, laŭ W. Auld, estas en tre bela kaj tre esprimiva Esperanto.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino
Numero: 1-Es-964S 128×208mm.

76 paĝoj bind.

Prezo: £0.66 US\$0.90

Aŝma



Prezo: £0.95 US\$1.95

Numero: 10-Es-253S 16×18cm.

84 paĝoj bind.

Versrakonto de la sania popolo, nacimalplimulto en Ĉinio. Temas pri gefratoj Aŝma kaj Ahej, kaj illaj aventuroj kaj penoj kontraŭ malbonulo Rabubala. Interalie troviĝas ankaŭ interesaj moroj de satioj. La traduko estas bela kaj la ilustraĵoj ravaj.
Esperantigis Laŭlum Hustris Huang Yongyu
Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj
(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La Granda Kanalo ĉe la antaŭurbo de Jining



De Jining al Weishan-lago

de LI PING

LA Granda Kanalo de Ĉinio estas la plej longa artefarita akvovojo en la mondo. Ĝi kun totala longeco de 1 782 kilometroj komenciĝas de Pekino kaj finiĝas en Hangzhou. Ĝi trafluas la provincojn Hebei, Shandong, Jiangsu kaj Zhejiang kaj interligas kvin ĉinajn grandajn riverojn Haihe, la Flava Rivero, Huaihe, Jangzi kaj Qiantang. Ĝia fosado komenciĝis en la kvina jarcento a. K., je 2 300 jaroj pli frue ol tiu de la Kanalo de Panamo. Ĝi, same kiel la Granda Muro, estas unu el la plej grandaj antikvaj konstruaĵoj de la mondo.

En la pasinta aŭtuno mi kiel turisto faris longan vojaĝon laŭ la Granda Kanalo. Ĉi-sube estas fragmentoj el mia taglibro pri mia vojaĝo.

12. okt. EN VAGONARO

Nelonge post kiam la trajno forlasis Pekinon, mi rapide amikiĝis kun miaj "najbaroj": sciencistino pri alt-energia fiziko, akvoutiliga inĝeniero kaj tri instruistoj. Informiĝinte pri mia vojaĝplano ili tuj ekhavis kun mi komunan temon de interparolo.

"La Granda Kanalo nomiĝas ankaŭ gren-transportanta rivero," diris al mi la inĝeniero pli-ol-40-jara. "En la historio granda parto de ĉinaj feŭdaj dinastioj fondis sian ĉefurbon en la norda kaj nordokcidenta partoj de Ĉinio, tamen lokoj abundaj je greno troviĝis sude en basenoj de la riveroj Jangzi kaj Huaihe. Tial transportado de la kolektita greno en suda Ĉinio al la ĉefurbo estis problemo atentata de la registaroj de ĉiuj dinastioj. En la antikveco ne estis aŭtoj nek trajnoj, kaj grandkvanta transportado dependis de akvovojoj. Sed la ĉefaj riveroj de Ĉinio fluas de okcidento orienten. Tial apartan rolon ludis tiam la Granda Kanalo kiel trafika aorto interliganta la sudon kaj nordon de Ĉinio."

"Mia hejmo sin trovas ĉe la bordo de la kanalo," ekparolis juna ĉinlingva instruisto, kiu sidis kontraŭ mi. Li kun fortika korpo kaj sunbruna vizaĝo aspektis kiel sportisto. "En la periodo Printempo kaj Aŭtuno, Fuchai, estro de la regno Wu en la malsupra baseno de Jangzi-rivero, por ĉasi hegemonion ordonis fosi kanalon inter la riveroj Jangzi kaj Huaihe en 486 a. K. por transporti armeanojn dum la batalado kontraŭ la najbaroj. Antaŭ la fino de la sesa jarcento Sui-dinastio unuigis Ĉinion. Por fortikigi sian regadon kaj rabi riĉaĵojn en suda Ĉinio la imperiestro Yangdi varbis milionojn da popoloj por fosi kanalon kun Luoyang kiel la centro. En la 13-a jarcento post kiam Yuan-dinastio (1271—1368 p. K.) prenis Pekinon kiel sian ĉef-

urbon, ĝi plu etendis la kanalon. Dank' al dragado en la dinastioj Ming kaj Qing la Granda Kanalo fariĝis pli perfekta kaj senbara. Sed pro la breĉiĝo de la Flava Rivero en 1855 en Shandong-provinco iuj partoj de la kanalo ŝtopiĝis. . .”

Jam falis profunda nokto kaj estingiĝis lampoj en la vagono. Ni ĉesis paroli kaj revenis al nia respektiva lito.

13. okt. EN JINING

Frumatene la trajno atingis la urbon Jining.

La urbo kun pli ol 200 000 loĝantoj estas sidejo de la subprovinca, urba kaj gubernia registaroj. Ĝi estas antikva kaj kvietra urbeto kun historio de pli ol 2 500 jaroj. En tiu regiono naskiĝis famaj ĉinaj pensuloj kaj edukistoj Konfuceo (551-479 a. K.) kaj Mengzi (372-289 a. K.). Oni povas diri, ke tie estis lulilo de la ĉina antikva filozofio kaj kulturo.

La Granda Kanalo trairas la urban centron.

Kiel grava konsistiga parto de la Granda Kanalo en Yuan-dinastio la kanalo en Shandong estis elfosita en la 13-a jarcento. Sed pro limigo de naturaj kondiĉoj kaj multaj instalaĵoj sur la kanalo estis malfacile veturi sur ĝi.

Verdire, mia unua impresoj pri la kanalo estis tre malbona. Akre kontrastante kun afiŝtabuloj, strataj lampoj, grandaj montrofenestroj kaj strataj florbedoj de la urbo, la malpura kanalo aspektis tute senviva. Mi informiĝis de aliaj, ke tiu parto de la kanalo jam de longe ne funkcias pro ŝtopiĝo kaj ĝin anstataŭis la nova, kiu finfosigis en 1958 kaj preterpasas la ĉirkaŭurbon.

La sorto de la urbo strikte ligiĝis kun tiu de la Granda Kanalo. Laŭ historiaj notoj, en Ming-dinastio tie estis unu el la plej prosperaj komercaj urboj de Ĉinio. Tion atestis la farejo de vino kaj peklitaj legomoj Yutang ĉe la bordo de la kanalo.

La farejo havas historion de pli ol 300 jaroj. Dank' al favoraj kondiĉoj liveritaj de la kanalo ĝi havis ŝancon lerni teknologion de la norda kaj suda partoj de Ĉinio pri farado peklitaj legomoj, aliaj almanĝaĵoj kaj vino, kaj pro tio ĝiaj pro-

duktitaj vinoj “Ora Ondo” kaj “Ruĝa Rozo” gajnis oran kaj arĝentan medalojn respektive en la Panama Internacia Foiro en 1915. Sed pro la ŝtopiĝo de la Granda Kanalo kaj militado la farejo malprosperiĝis iam kaj preskaŭ bankrotis. De la lastaj jaroj ĝi denove prosperiĝis kaj dekkelkaj specoj de ĝiaj produktaĵoj kiel ekzemple kalkitaj ovoĵoj, pipra oleo, karpajo kun aparta gusto, miksitaj plado k. a., estas vendataj en multaj landoj.

La Domo de Li Bai sin trovas en la centro de la urbo, je 100-200 metroj for de la kanalo. En Tang-dinastio tie loĝis la granda poeto Li Bai kun siaj familianoj 23 jarojn. Li Bai, serena kaj sentima al potenculoj, tre amis drinki kaj vojaĝi. Iuj el liaj poemoj estas vaste konataj en Ĉinio. En 736 p. K. li kun siaj familianoj venis al Jining kaj loĝis en la drinkejo Helanshi. Post la morto de la mastro ĝi fariĝis hejmo de Li Bai. En 861 p. K. alia poeto de Tang-dinastio Shen Guang pilgrimis al la domo kaj verkis poemon “Notoj pri la Domo de Li Bai”, kaj pro tio la domo ricevis sian nomon.

15. okt. EN KARBOMINEJO XINGLONGZHUANG

Matene ni ekveturis al la karbominejo Xinglongzhuang, kiu apartenas al la Karbomineja Administracio Yanzhou. Pro densa nebulo nia jipo devis malrapidigi sian kuradon. Tie kokoj, anasoj kaj kaproj senzorge promenis sur la ŝoseo, tute ne atentante trumpetadon de nia aŭto.

Yanzhou estas unu el la dek grandaj karbominejaj administracioj de Ĉinio kaj famas tra la tuta lando pri sia alta modernigo. Tie Ĉinio ekspluatas karbon kune kun Francio, Japanio kaj Svedio laŭ sistemo de kompensa komerco. Ĝi finkonstruiĝos en 1987, kaj tiam ĝi ĉiujare povos ekspluati 12.85 milionojn da tunoj kaj lavi 10 milionojn da tunoj da karbo. La Pekin-Ŝanhaja Fervojo kaj la Granda Kanalo trairas Yanzhou, kiu tre utilas al la transportado de karbo. Kaj krome oni konstruas fervojon kondukantan al la haveno Shijiu. Ĉio ĉi tio tre favoras al la transportado de la minejo.

Kiam ni atingis la karbominejon Xinglongzhuang, jam sereniĝis la tago. Tie la karbotavolo estas dikaj, la karbo bonkvalita kun mal-

EVOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALOJ (I)

multa sulfuro kaj pulvoro kaj taŭga por fari koakson. Ĉar ĝi aplikis novan teknologion kaj novan teknikon dum sia konstruado, ĝi sukcesis ekfunkcii tuj post ses kaj duona jaroj. Nun ĉiujare ĝi povas produkti tri milionojn da tunoj da karbo. Ankaŭ ĝia konstruata karbolavejo ĉiujare povos lavi tri milionojn da tunoj da karbo.

16 okt. ĈE WEISHAN-LAGO

Mi daŭrigis mian vojaĝon suden laŭ la Granda Kanalo kaj atingis la vastan Weishan-lagon.

La lago kun areo de 120 000 hektaroj ofte inundis la ĉirkaŭajn kampojn. Ekde 1958 la tiea popolo konstruis en ĝi grandan barajon kun tri kluzoj kaj unu ŝipkluzo, kiu dividis la lagon en du partojn. Kaj krome, oni konstruis la kluzon Hanzhuang ĉe la elirejo de la Granda Kanalo en Weishan-lago kaj digon longan je 150 kilometroj ĉe ĝia okcidenta bordo. Dank' al tio Weishan-lago obeeme servas al la agrikultura produktado, irigacianta kampojn de 34 gubernioj ĉirkaŭ si.

Yutai-gubernio ĉe la okcidenta bordo de Weishan-lago ofte estis inundita. 70% de ĝia tero situas malpli alte ol la akvonivelo de la lago. En pluva sezono la loko fariĝis kiel maro, kaj pro tio eĉ gubernia administrejo en la malnova Ĉinio trifoje transloĝiĝis devigite.

En la pasintaj pli ol dek jaroj la popolo de Yutai-gubernio ne nur ordigis la lagon, sed ankaŭ dragis malnovan kanalon, konstruis la novan, tiel formiĝis en la gubernio irigacia sistemo, kiu povas akvumi ĉiujn kampojn de la gubernio dum 24 horoj. Nun tie fariĝis vera loko abunda je grenoj kaj fiŝoj.

Mi vizitis Mitan-brigadon de Guting-komunumo de la gubernio. Ĝi estis tre malriĉa en la pasinteco pro naturaj katastrofoj. Nun tute ŝanĝiĝis la situacio. La brigado kun 400 familioj ĉi-jare liveris al la ŝtato 400 tunojn da tritiko.

Mi intervjuis 82-jaran avon Yan Chengzhang. Li estas tre sana, sed iom surda. Lia nepo, kiu lernas en mezlernejo, servis kiel nia interpretisto.


La pliaĝa filo de la maljunulo mortis en la Liberiga Milito kaj lia pli juna filo laboras kiel funkciulo de la gubernia administrejo. Lia fami-

lio estis komisiita kulture ĉ. duonon da hektaro da kampoj, kiun zorgas lia pli juna bofilino sole. Dank' al sia diligenta laborado ŝi rikoltis pli ol kvin tunojn da greno kaj enspezis sume 2 800 juanojn en la pasinta jaro.

Weishan-lago estas abunda je fiŝoj kaj akvo-plantoj. En ĝi vivas pli ol 70 specoj de fiŝoj. Sed pro konstruado de instalaĵoj en la lago malmultiĝas por fiŝoj ejoj demeti ovojn kaj serĉi nutraĵojn. Krome kluzoj de la Granda Kanalo baras la revenan vojon de fiŝoj, troa fiŝkaptado superas la regeneran povon de fiŝoj kaj malpura akvo ellasita de fabrikoj polucias la akvon en la lago, ĉio ĉi tio rapide reduktas la produktokvanton de fiŝoj en ĝi. Nun tio jam altiras la atenton de koncernaj institucioj.

La Granda Kanalo trafluas Weishan-lagon, eliras el la kluzo Hanzhuang kaj eniras en Jianguo-provincon, kie estas la urbo Xuzhou baldaŭ vizitota de mi.

MAPO DE LA GRANDA KANALO DE ĈINIO






LA BELA LAGO WEISHAN

Fotoj de REN SHIYIN

[VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO] (1)



La lago Weishan




Fiškaptaj boatoj velantaj sur la lago



La lago en mateno


Junaj fiŝistinoj






Pandionoj bredataj por fiŝkaptado

Kluzo ĉe Hanzhuang, inter la lago Weishan kaj la Granda Kanalo






Korto

En câmbro

Fenestro




Bildoj pri kamparana vivo

(Serio da olepentraĵoj)

de CAO CHANGWU

Tiuj belaj pentraĵoj prezentas la
vivmanieron de kamparanoj en
orienta Shandong-provinco.



Tenejo

Sur terlito



V. 19034 / 1983

